

ISSN 1846-5021

GAZETO DE
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

Zagreba Esperantisto

Հոկտեմբերի
30-րդ 2013 թվական

Ĉi-numere legu pri:

LA 24-a MKR EN JANKOVAC

NOVAĴOJ PRI ESPERANTO-BIBLIOTEKOJ

BJELOVARAJ ESPERANTISTOJ

AL SIA URBO

LA 11-a VERKISTA RENKONTIĜO

FORPASIS JERZY FORMAL - LA LASTA

GRANDULO DE ESPERANTO-TEATRO

Preĝejo de Sankta Marko en Zagrebo
Fotis: Radenko Milošević

4

2013

Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

Ĉefa kaj respondeca redaktoro:

Radenko Milošević
Goljak 43
HR-10000 Zagreb
Kroatio
rmilos23@gmail.com

Plenumredaktoro:

Josip Pleadin
B. Jelačića 138 A
HR-48350 Durdevac
Kroatio
josip.pleadin@gmail.com

Ekspedejo:

Grafokom, p.p. 96
HR-48350 Durdevac
Kroatio
grafokom@kc.htnet.hr
zagreba.esperantisto@gmail.com

Redakcianoj:

Krešimir Barković, Snježana Habulin, Marija Jerković, Jozo Marević, Radenko Milošević, Josip Pleadin

Presis:

Grafokom, Durdevac

Jarabono (6 numeroj):

120,00 kunaoj / 18,00 eŭroj

Pagebla al konto de Dokumenta Esperanto-Centro:

HR5023600001102158381

aŭ al UEA-konto:

deoc-f

RESUMO

En Kroatio ni havis abundan aŭtunan aranĝo-rikolton. Dum septembro okazis eĉ tri renkontiĝoj en diversaj regionoj. La plej granda estis la aranĝo "Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo", organizita de Bjelovara Esperantista Societo okaze de Tago de la urbo en Bjelovar. Por la 11-a fojo okazis Renkontiĝo de Esperantlingvaj verkistoj en Hraščina, kaj la naturamika MontKabana Renkontiĝo (MKR) daŭrigis la belajn tradiciojn en la nova regiono - Slavonio. Se vi ne povis partopreni, ni prezentas al vi raportojn pri ĉiuj tri aranĝoj, nutrante vian scivolemon por iu alia fojo.

La 15-an de oktobro oni festas la tutmondan Tagon de la blanka bastono, dediĉitan al nevidantaj kaj vidhandikapitaj personoj. La membroj de Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj (KUNE) partoprenis la Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj (IKBE) en Bulgario. Ni publikigas la raporton kaj la referaĵon de Antun Kovač pri la stato de nevidantoj en Kroatio.

Literaturaĵoj ja multas ĉi-numere. Eĉ tri recenzojn ni prezentas al niaj legantoj, kaj unu tradukon el la germana. Du el la recenzoj rilatas la verkon "Padma, la eta dancistino" de Tibor Sekelj, pri kies 25-a mortodatreveno oni plurloke rememoris dum septembro. Pro spacomanko, la raporto pri la omaĝa programo organizita por Tibor Sekelj en "lia urbo" Subotica, aperos en la sekva numero.

La Esperanto-movado perdis sian lastan grandulon el la flora tempo de la Esperanta teatro. Forpasis Jerzy Fornal, pri kiu ni publikigas nekrologan tekston.

Al Esperantaj bibliotekoj ni dediĉas iom pli da spaco ol kutime. Ni ekscias plurajn novaĵojn el la teksto de Roland Rotsaert, kaj informas vin pri la 5-jara festo de Esperanto-muzeo en Svitavy (Ĉeĥio).

La pasintajn someron kaj aŭtunon karakterizas la nekutime ofta mencio de Esperanto en la kroataj mediatoj. Pro tio ni publikigas nekompletan liston de artikoloj kaj elsendoj kiuj menciis Esperanton - senescepte en pozitiva senco! Se vi scias pri aliaj mencioj, ni petas ke vi informu nian redakcion.

La strategia celo de nia redakcio estas atingi la nombron de 300 regulaj abonantoj, kio garantius senĝenan aperadon de "Zagreba Esperantisto". Ni petas vin konsideri, ke tiu celo estas atingebla nur kun via regula financa subteno en formo de abonoj kaj donacoj. Dankon al multaj kiuj jam helpis al ni en tiuj klopodoj.

LA PLACO DE SANKTA MARKO

Radenko Milošević

Kial artikoli pri la zagreba *Placo de sankta Marko*? - povus demandi la legantoj? Tiu placo estas la koro de la kroata ŝtata, politika, jura kaj socia vivo. Dum jarcentoj ĝi estis atestanto de gravaj eventoj, inkluzive de la lasta decido per kiu Respubliko Kroatio, la 1-an de julio 2013, fariĝis plenrajta membro de Eŭropa Unio.

La kroata poeto, membro de Kroata jura partio (kroate: *Hrvatska stranka prava*) kaj konvinkita batalinto kontraŭ ia ajn balkanismo, jugoslavismo kaj aŭstri-hungarismo, *Antun Gustav Matoš*, jam en 1903 en Parizo, la solvon de la kroata nacia problemo metis en tiam politike utopian kadron: "*Vi ja bone scias, ke nia plej granda pasio estas Eŭropo, la Okcidento kaj la eŭropaj arto, scienco kaj libereco... Ni ne estas nur kroatoj, sed ankaŭ eŭropanoj... Eŭropo devas iom post iom konstrui ekonomian unuigon kiu samtempe devas rezulti socion de politiko kaj politikon de demokratio ...kio estos la solvo de subpremitaj kaj humiligataj (nacioj kaj ŝtatoj), kaj tio koncernas ankaŭ nin kroatojn!*". Li estis adepto de kroata memstareco, sed li asertis, ke ties solvo troviĝos en la komunumo, kiun kune ekkonstruis Francio kaj Germanio en 1957.

La *Placo de sankta Marko* situas sur unu el la du montetoj de Zagrebo. Unu parto de malnova Zagrebo situas sur *Gradec* (aŭ *Grič*), ĉe la suda deklivo de la monto *Medvednica*. La nomo Grič kroatingve signifas "ŝtono". La dua parto de la nuntempa Zagrebo nomiĝas *Kaptol*. Antaŭ la kuniĝo de la du partoj, *Gradec* estis memstara komunumo de komercistoj, metiistoj kaj ordinara plebo, dum *Kaptol* estis posedaĵo de la zagreba katolika eklezio, kie rezidis la

zagreba episkopo kaj aliaj ekleziaj moŝtuloj. La du partoj (*Gradec* kaj *Kaptol*), kuniĝis la 7-an de septembro 1850 en *Zagrebon*, kiam komenciĝis moderna administra epoko de la ĉefurbo de Kroatio.

En la jaro 1242 la kroata-hungara reĝo *Béla la 4-a*, atribuis al loĝantoj de *Gradec* unu el la plej signifoplenaj dokumentoj en la historio de Zagrebo, la "*Oran buleon*". Per tiu dokumento *Gradec* fariĝis "libera reĝa urbo" kaj ricevis privilegiojn de liberaj elektoj, negocado kaj foirado. Per la buleo *Gradec* estis ankaŭ devigita konstrui kaj rekonstruadi fortikajn urbajn muregojn. Tiuperiode *Gradec* akiris planon de stratoj, kies formo kaj situo ĝis la nuna tempo ne tro ŝanĝiĝis. En la mezepoko en *Gradec* nur kelkaj ŝtatoj havis la nomojn. La nuna Ĉirilometodska, estis *La meza*, la Strato de D. Demetar estis *La kota*, la Strato de P. Radić estis *La longa*, kaj la Strato de A. G. Matoš nomiĝis *La buĉista*.


En la centro de la placo situas la *Preĝejo de Sankta Marko*, unu el la plej malnovaj arkitekturaj monumentoj de Zagrebo. La preĝejo estis konstruita kiel trinava konstruaĵo komence de la 14-a

jarcento. Ĝi havas impresivan enirejan portalon, kaj apud ĝi situas la malhonoriga kolono, al kiu estis ŝnuritaj punitoj. Kun sia pitoreska sonorilturo la preĝejo esceptas ankaŭ per la tegmentaj glazuritaj tegoloj. La tegoloj kolore prezentas en la dekstra flanko la blazonojn de *Kroatio*, *Dalmatio* kaj *Slavonio* kaj maldekstre situas la blazono de *Zagrebo*. La plej bela parto de la preĝejo estas la suda portalo el la komenco de la 15-a jarcento kun multaj ŝtonaj gotikstilaj kaj lignaj barokstilaj skulpturoj de sanktuloj.

La internon de la preĝejo ornamas skulptaĵoj de la mondfama skulptisto *Ivan Meštrović*. Ĉe la ĉefaltaro troviĝas lia "Krucumita Kristo", kaj la preĝejon pliriĉigas freskoj de *Jozo Klaković* kaj bildoj de *Ljubo Babić*.

La limo inter *Gradec* kaj *Kaptol*, estis la rivereto *Medveščak* (aŭ *Cirkvenik*) kiun transportis *La sanga ponto* (kroate: *Krvavi most*). Sian nomon ĝi ŝuldas al sangaj konfliktoj inter la "ordinaraj" loĝantoj de *Gradec* kaj la "ekleziaj" loĝantoj de *Kaptol*, ĉefe pro la pontoimpoŝto.

Ĉirkaŭ la placmeze lokita *Preĝejo de Sankta Marko* troviĝas



diversaj konstruaĵoj de la politika vivo de Kroatio. La nordan parton de la Placo okupas la konstruaĵo de la Konstitucia tribunalo, oriente staras la parlamentejo, okcidente la rezidejo de la ŝtata registaro la t. n. **Banusa palaco**, sude la konstruaĵo de la iama nacia teatro kaj nuntempe la sidejo de la zagreba deputitaro. Suden etendiĝas la Strato de Cirilo kaj Metodo, kroataj kaj slavaj klerigantoj.

La surplacaj konstruaĵoj povus rakonti interesajn historiojn. Unu el tiuj estas la rakonto pri la ekzekuto de **Ambroz Matija Gubec**, unu el la gvidantoj de la **Kampanara ribelo** en 1573, kiu estis moke kronita per brulvarma fera krono kaj poste kvaronumita antaŭ la Preĝejo de sankta Marko.

Ĉe la suda parto de la Placo situas la **Malnova urbodomo** kie nun rezidas la deputitaro de Zagrebo. En la 15-a jarcento oni nomis la tie troviĝintan konstruaĵon "la domo de la konsilantaro de la zagreba Gradec". La urba administracio certigis en la jaro 1833 sufiĉe da spaco por tie konstrui la **Urban teatrejon**, pli poste nomatan **Popola teatro**. Tie oni povis la unuan fojon aŭdi la kroatan lingvon en la vekkanto "Ankoraŭ Kroatio ne pereis" de **Ljudevit Gaj**. Samloke la unuan fojon estis prezentita en 1840 la kroatlingva dramo "**Juran kaj Sofia aŭ Turkoj antaŭ Sisak**" de la nobelo **Ivan Sakcinski** kaj en 1847 la unua kroata opero "**Amo kaj malico**" de **Vatroslav Lisinski**. En tiu konstruaĵo, post la propono de la nobelo **Ivan Sakcinski**, la kroata lingvo estis proklamita oficiala. Tie kunsidis la kroatia parlamento **Sabor** sub la prezido de la banuso **Josip Jelačić**. Post la malfermo de **Kroatia popola teatrejo** en 1895, Zagrebo transprenis la antaŭan konstruaĵon. En 1958 la urba administracio translokiĝis en novan konstruaĵon, kaj en la **Malnova urbodomo** poste kunvenadis la urba deputitaro kaj fakaj oficejoj de Zagrebo.

Sur la muro de la konstruaĵo estis muntita la tabulo

memore al la 24-a de majo 1892, kiam **Nikola Tesla** proponis al urbaj oficistoj "konstruadon de elektrejo de alterna kurento".

Al la Placo kaj la parlamentejo estas ligita tre bizara evento, okazinta la 5-an de oktobro 1885 kaj nomita "piedbato kontraŭ la banusa pugo". Post la sufoko de la hungara revolucio, la banuso **Josip Jelačić** invitis al Budapeŝto la faman kroatan historiiston **Ivana Kukuljevića Sakcinski** por dividi kroatajn arkivaĵojn disde la hungaraj, por retransporti ilin al Zagrebo. Sed kiam la nova banuso **Khuen Héderváry** eldiris en la kroatia parlamento ofendajn vortojn, ke "li dubas pri la honesta sinteno de Kroatio rilate al tiuj ĉi dokumentoj", ekkoleris la membroj de Jura partio kaj ekestis tumulto. La banuso ĉesigis sian paroladon intencante foriri al sia oficiala banusa ejo, sed kiam li preterpasis la benkojn en kiuj sidis la membroj de Jura partio, ekstaris la deputito d-ro **Grga Tuškan** kaj piedbatis la banusan postajojn.

En 1918, sur la Placo de sankta Marko, ekscitaj kaj eŭforiaj "la popolaj reprezentatoj" solenis la disiĝon de Aŭstri-Hungara monarkio kaj la **Popola konsilantaro de Slovenoj, Kroataj kaj Serboj** hastis al Beogrado, por porti al la serba regento **Aleksandar** la proponon kunigi la Ŝtaton de Slovenoj, Kroataj kaj Serboj kun la Reĝlando Serbio. Stjepan Radić en la parlamento, nokte, la 24-an de novembro 1918, profete eldiris sian averton: "*Ankoraŭ ne estas tro malfrue! Ne hastu senpripense kiel anseroj en nebulon!*". Tiu averto de Radić poste ĉiam ŝvebis antaŭ la kroata popolo.




En 1990, kiam la oficialaj organoj de la tiama Socialisma Respubliko Kroatio akceptis la registradon de ok novaj partioj, okazis parlamentaj elektoj en Kroatio. Ne temis ankoraŭ pri elektoj en la nuna kaj okcidenteŭropa senco. Tiam oni elektadis reprezentantojn en socialisma parlamento de ankoraŭ

ekzistinta socialisma Jugoslavio. Tamen ili estis plurpartiaj elektoj post kio veni konstituigo de la novelektita plurpartia **Sabor**. Per tio komenciĝis nova paĝo en la kroatia historio kiu gvidis al sendependiĝo. Baldaŭ venis la tago kiam sur la alta masto antaŭ la konstruaĵo de la parlamentejo, estis anstataŭita la ĝistia standardo havinta komunisman ruĝan kvinpintan stelon, per la tradicia kroata ruĝa-blanka-blua standardo, kiu en la blanka kampo havas la historian blazonon kun 25 blankaj kaj ruĝaj kvadratoj.

Konforme al la rezultoj de la referendumo okazinta la 25-an de majo 1991, kiun partoprenis pli ol 83% da kroataj voĉdonantoj akceptintaj per 94% ekziĝon el la tiama komuna ŝtato, unu monaton poste, la 25-an de junio, **Sabor** proklamis **Konstitucian decidon pri la disiga proceso el la komuna ŝtato** kaj **Sabor** akceptis **Deklaracion pri proklamo de la suverena kaj sendependa Respubliko Kroatio**. Kontraŭ la proponita decido de Sabor estis membroj el la tiama komunisma SKH-SDP, kiuj antaŭ la voĉdonado demonstracie forlasis la grandan salonon de Sabor, ĉar ili deziris novan asociiĝon en konfederacia Jugoslavio.

La 7-an de oktobro 1991 estis ĵetitaj misiloj al la Banusa palaco. La bombardado de la Banusa palaco okazis en la momento, kiam en la Palaco kunsidis prezidento de Respubliko Kroatio **Franjo Tuđman** kun la prezidanto de la prezidantaro kaj premiero de eksa Jugoslavio kaj aliaj kroataj ŝtataj eminentuloj. Tial la **Decido pri disiĝo** ne estis akceptita en la historia konstruaĵo de kroatia parlamento, sed sur la Placo de sankta Marko. Kaŭzo de la trimonata prokrasto de ĝia apliko estis la kontaktoj kun la internacia komunumo, respektive la "Deklaracio de Brijuni", kaj la Decido estis definitive publikigita la 8-an de oktobro 1991 ĉe la solena parlamenta kunsido en la subtera ejo de la entrepreno INA, en la Strato de Ŝubić.





TRI OSTETOJ – KVARONO DA KARNO

✍ Radenko Milošević

Sub la titolo *"Tri koščice - kvarat mesa"* (Tri ostetoj - kvarono da karno), Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE) eldonis la kvarvoluman kroatingvan vivhistorion de sia 85-jara membro **prof. Nikola Turk**. Dum pli ol tri jardekoj li verkadis kaj priskribadis siajn memoraĵojn, eventojn kaj pensojn. La "tetralogio", kiel ĝi estis antaŭanoncita, estis prezentita en la granda salono de *Matica Hrvatska* en Zagrebo la 20-an de septembro. Kun vera plezuro nia Unuiĝo havis la okazon prezenti tiom ampleksan eldonon, la aŭtobiografion de s-ro **Turk**, ĉar la prezenton ĉeestis elstaraj reprezentantoj de la Akademio pri sciencoj kaj artoj kaj de Matica Hrvatska mem, kaj multaj aliaj elstaruloj el la kroata publika vivo kaj kulturo.

Menciendas, ke partoj de la biografio tuŝas la kunlaboron de la aŭtoro kun esperantistoj, speciale okaze de la centjariĝo de Esperanto en Kroatio.

La kvarvoluma verko ampleksas preskaŭ mil paĝojn. Ĝi estas plurtavola kaj diverse abunda en unuopaj volumoj. Laŭ la ŝerco eldirita dum la prezento, la dua volumo ne estas tro ampleksa, ĉar ja temas nur pri

tridek mil tagoj. La volumoj portas la jenajn subtitolojn: I. Infanaĝo, II. Plenkreskiĝo, III. Matura aĝo kaj IV. Adiaŭo.

La unua volumo priskribas sur 188+32 paĝoj la plej fruan infanaĝon, plenan je malfacilaj kaj tragikaj eventoj. En la dua volumo la aŭtoro pritas la tempon ĝis la fino de la dua mondmilito (375+32 paĝoj), la tria volumo (kun 200+32 paĝoj) estas aparte impresiva ĉar temas pri la plej aktiva vivoparto de la aŭtoro, dum kiu li estis tre aktiva en la sporta kampo. La kvara volumo estas resumo (88+48 paĝoj), kronologio de aktivado en sportaj kaj aliaj asocioj, filatelo kaj la familia vivo.

Indas memori, ke neniu homo mortas. Li transformiĝas al Lumo kaj pluekzistas.

Ni citu la vortojn de grandulo kiu diris: *"Ne malfeliĉu ĉar en ĉi tiu mondo neniu pri vi scias. Kial vi opinias, ke vi estas tiom grava, por ke oni devu vin koni? Kiam vi estos vere grava, eĉ sen pensi pri tio, oni scios pri vi."* (Konfuceo).

Ne ekzistas adiaŭo eĉ post la kvara aĝo. Mi atendas daŭrigon de tiu "tetralogio", ĉar mi ne volas akcepti la Huxley-ecan opinionon ke ... ankaŭ la tempo devas halti.



Pri la kroata beatulo Miroslav Bulešić

✍ Laŭ IKA (Informa katolika agentejo)

Katolikaj esperantistoj tra la mondo konatiĝis tra la retejo de *Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista* (IKUE) www.ikue.org kun la nova kroata beatulo **don Miroslav Bulešić**. Al Esperanto estas tradukita la biografio de la nova kroata beatulo, fare de tradukista grupo el Italio: **Antonia De Salvo** (Romo), **Edvige Ackermann** (Triesto), **Laura Gentilli** (Arezzo), **Paola Giommoni** (Arezzo), kaj la vicprezidantino de IKUE **Marija Belošević** el Zagrebo (Kroatio). Ĉar la esperantistoj montris grandan interesigon pri la nova beatulo, planata estas eldono de aliaj ĉi-temaj materialoj en Esperanto.

LA 24-a MKR GASTIGITA EN JANKOVAC



 Vanja Radovanović

Jankovac, unu el la plej belaj anguloj de Slavonio, gastigis ĉi-jare, inter la 26-a kaj 29-a de septembro, la **24-an MontKabanan Renkontiĝon** (MKR), la tradician aranĝon por mezeŭropaj Esperantlingvaj naturemuloj. Bedaŭrinde, krom pro la kutima slavonia gastamo, bonaj manĝaĵoj kaj vastaj arbaroj de monto **Papuk**, la ĉi-jara MKR estos memorigita pro multe da pluvo kaj malvarmo, kaj manko de suno ... Laŭ pluraj kutimaj partoprenantoj, ĝi estis la plej malsuna MKR el ĉiuj ĝisnunaj!

Malgraŭ ĉio, indis partopreni la aranĝon kaj viziti **Papuk**, la konatan naturparkon kiu pro sia, por Kroatio nekutima geologia historio, montras al vizitantoj alian vizaĝon de Slavonio (kiun oni ofte imagas nur kiel malinteresan ebenajon) kaj kroataj montoj (kiuj ĉefe estas karstaj kaj kalkŝtonaj). Ĝuste pro tio, la ĉi-jara MKR deziris montri al siaj partoprenantoj tiun flankon de Kroatio kaj Mezeŭropo, ĉar la antaŭaj MKRoj estis ĉefe koncentritaj pli okcidente, en Alpoj kaj najbaraj montoj, inkluzive la apudmaran Kroation.

Antaŭ la MKR la eksterlandaj montmigrantoj deman-

dis sin: kion montmigrantoj faru en la slavonia ebenaĵo? Ĉu eblas montmigri en la regiono sen montoj?

Tamen, klarigis la MKR-organizantoj ke, se oni rigardas la mapon de orienta Kroatio, videblas ke en tiu granda ebenaĵo (parto de vasta mezeŭropa Panonia ebenaĵo kiun Kroatio dividas kun Hungario, Serbio kaj partetoj de Aŭstrio, Slovakio, Ukrainio kaj Rumanio) tamen troviĝas montoj kiuj iam, antaŭ multaj jarmiloj, estis insuloj. Tiuj montoj ja ne estas Alpoj kaj ne superas mil metrojn (kvankam ili tre proksimas tian altecon!), sed tamen ofertas interesan naturon kaj enrigardon en la ĉiutagan vivon de la regiono ĝis nun tute ne vizitita de MKR.

Kaj kompreneble, vizitindis ankaŭ la montkabano **Jankovac**, la plej konata ripozejo en la regiono, ene de la naturparko **Papuk**. Kroatio ja estas ĉefe karsta lando, plenplena de kalkŝtonaj formoj kaj fenomenoj, sed la monto **Papuk**, kune kun la najbaraj montoj kaj montetoj, ofertas tute alian etoson, geologie pli malnovan. **Jankovac** mem ofertas ĉion kio povus feliĉigi vizitantojn – trankvilan herbejon apud lagetoj kaj riveretoj meze de densaj arbaroj, akvofalon, grotojn,

interesan historion kaj, ankaŭ grave, bonan loĝeblecon kaj bonegan manĝaĵon kunigitan kun la tradicia gastamo de tiu regiono.

Kaj jen surloke, 21 partoprenantoj el 6 landoj venis al la ĝusta loko por ekkoni la plej bonan de la regiono ... nur, bedaŭrinde, ĉi-jare la vetero ne kunlaboris. Dum tri tagoj la suno videblis dum nur 5 minutoj kaj pluvo abundis (kvankam tiu regiono estas unu el la plej sekaj en Kroatio!) ... La migrantoj estis bone ekipitaj per pluvmanteloj, pluvombreloj, fortaj ŝuoj kaj ĉiuj ekskursoj estis bone vizititaj ... sed, sekigantaj vestaĵoj en la ĉambroj kaj kotoplenaj ŝuoj memorigis nin ĉiuvespere pri la finitaj ekskursoj.

La ekskursoj gvidis la partoprenantojn unuatage al **Ivačka glava** (914 m), la dua plej alta pinto de **Papuk**, de kie, dum bela vetero, videblas la kroata ebenaĵo kaj hungaraj montetoj. Belan rigardon ĉi-foje ni ne povis ĝui ĉar kovris nin dum la tuta tago nuboj, kiuj nur je kvin minutoj, surpinte, lasis iom da sunradioj al malsekaj marŝantoj. Tamen, belaj arbaroj kovritaj per nebulo montris al ni mistikan kaj fabelan etoson, kaj nia ejo ŝajnis romantika kastelo meze de la densaj arbaroj. Scivolemuloj provis ankaŭ trovi kelkajn speleologiajn objektojn survoje, fungoj abundis, fotantoj faris eble eĉ pli da fotoj ol kutime, dank' al la ne tiel ofte vidata nebuletplena pejzaĝo.

La dua ekskurso gvidis la ekskursantojn al la ruinoj de la fortikaĵoj **Ružica** kaj **Stari grad**, kiuj iam, dum la mezepoko kaj turkaj atakoj, donis la sekurecon al la regiono. Nun la restaĵoj, troviĝantaj sur pintoj de montetoj, parolas pri iu preskaŭ forgesita epoko, kiam la arbaroj estis pli sekuraj ol la ebenaĵoj, en kiuj nuntempe ĉiuj vivas. Post la vizito al la ruinoj estis vizitita ankaŭ la pinto **Kapava** (790 m). Bedaŭrinde, denove la pinto estis kovrita per nuboj, ĉi-foje eĉ sen ajna sunradio. Por kompensation, la marŝantoj trovis amason da fungoj, arbaraj beroj kaj fruktoj, kaj la rikolto verŝajne estis la plej amuza parto de la ekskurso. La marŝantoj interŝanĝis konojn pri sovaĝaj fruktoj kaj ilia gustumado donis multe da ĝojo al ĉiuj.

La lasta tago kun forta pluvo permesis nur la promenadon ĉirkaŭ la montkabano, kaj viziton al akvofalo kaj najbaraj grotoj. Somere la akvofalo preskaŭ sekigiĝis,



sed ŝajnas, ke ĉi-aŭtune oni ne devas zorgi pri la akvokvanto. La eduka pado, kiu estas taŭga por ĉiuj, vere montras la plej belajn detalojn de **Papuk!**

Fine kaj konklude: spite al la malbela vetero, la partoprenintoj ĝuis la viziton al la ĝis nun nekonata

regiono. La etoso de la grupo estis tre bona, kaj tio ja estas plej grava, ĉu ne? Venontjare, por la jubilea, 25-a MKR, denove estas planata surprizo ... sed pri tio bonvolu informiĝi ĉe la MKR-retpaĝaro <http://www.keja.hr/mkr.html> dum marto 2014!



Ĉi-jare oni celebris la 130-an naskiĝdatrevenon de **Ivan Meštrović**, la fama kroata skulptisto, kiu lasis profundan spuron en la arto de la 20-a jarcento. Li naskiĝis la 15-an de aŭgusto 1883 en slavonia vilaĝo Vrpolje, kvankam li devenas el la malriĉa regiono de Dalmatinska Zagora (Kroatio Postmontaro), en kiu li pasigis sian infanaĝon (en la vilaĝo Otavice).

Lian talenton jam en la aĝo de 16 jaroj rimarkis la ŝtonĉizisto **Harold Bilinić** el Split, kiu prenis lin kiel metilernanton. Meštrović edukiĝis en Vieno, kie li preparis ankaŭ sian unuan

LA ARTA SPURO DE IVAN MEŠTROVIĆ

Josip Pleadin

ekspozicion en 1905, per kiu li atingis la unuan popularecon. En 1908 li translokiĝis al Parizo, kie li dum nur du jaroj faris pli ol 50 skulptaĵojn. Tiutempaj verkoj havigas al li internacian famon. Kvar jarojn li pasigis en Romo studante la antikvajn helenajn skulptaĵojn. En la Monda ekspozicio okazinta en Romo en 1911 li ricevis la unuan premion por skulptarto, ankoraŭ pli populariĝis kaj akiras la simpatiojn de italaj kaj internaciaj artkriticistoj. Antaŭ la unua mondmilito li elmigris el sia patrujo, kaj en 1915, kiel unua vivanta artisto, preparis unupersonajn ekspoziciojn en la londonaj muzeoj **Albert** kaj **Victoria**.

En la periodo inter la du mondmilitoj li estis profesoro en la Supera artlernejo en Zagrebo, kaj tre produktema artisto, vojaĝanta tra la

tuta mondo kaj ekspozicianta siajn verkojn. Pro sia kontraŭfaŝisma sinteno, dum la dua mondmilito li devis denove elmigri kaj pasigi la militan periodon en Svislando. En 1946 li elmigris al Usono kaj en 1954 akiris la usonan ŝtatanecan.

Grandan parton de sia arta heredaĵo, Meštrović donacis al Kroatio kelkajn jarojn antaŭ sia morto. Li mortis en South Bend en Indiano (Usono) en la jaro 1962, sed li estas enterigita en la t.n. Maŭzoleo de la familio Meštrović en la devenvilaĝo Otavice. Lian verkaron plejparte konsistigas religiaj objektoj, granddimensioniaj skulptaĵoj el marmoro, bronzo kaj ligno, kombinitaj en arhaja, "gotikiga", secesia kaj ekspresionisma stiloj. Li estis fama kiel konstruinto de maŭzoleoj kaj preĝejoj, inspirita per la stilo de malnovkroataj preĝejoj.

MEKANIKA SOZIO

(Originala titolo: "Doppelgänger")

 Hermann Kasack (1896 – 1966)

El la germana tradukis la Esperanto-grupo de Kronach: Gosbert Gehlert, Armin Grötzner, Siegbert Herrgesell, Brunhilde Lorenz

"Zagreba Esperantisto" publikigas la rakonton "Mekanika sozio" kun afabla permeso de sinjorino Friederike Kasack.

"Iu sinjoro deziras paroli kun vi", avizis la sekretariino. Mi legis sur la vizitkarto: Tobias Hull, B.A. – Neniu ideo. Post mia demanda rigardo ŝi diris: "Sinjoro en la plej bonaj jaroj, eleganta."

Ŝajne eksterlandano. Ĉi-am tiaj ĝenoj. Iu ajn agento. Ĉu? Kion oni scias. – "Bonvole enirigu lin."

Sinjoro Tobias Hull envenas per singardaj paŝoj. Li metas piedon antaŭ piedo, kvazaŭ timante fari tro firman surpaŝon. Ĉu li suferas pri io? Lian aĝon mi taksas je meze de kvardek. Granda afableco radias el lia glate razita, ne malsimpatia vizaĝo. Tre korekte vestita, preskaŭ tro ekzakta en siaj komplezaj movoj, li ŝajnas al mi. Nu, oni vidos. Per la mano montrante al la fotelo mi diris: "Kio kaŭzigas al mi la honoron de via vizito?"

"Oh! Mi volis nur prezenti min al vi."

"Tre agrable", mi diras.

"Oh! Vi komprenas!" Ĉi tiu per iom hurlanta sono eligita "Oh!" estas malimitebla. Lia laca, iom monotona voĉo, havas malfortan fremdan akĉenton. Li alrigardas min kun afabla atendo.

Pri la konduto de la vizitanto, ja iomete surprizita, mi ripetas: "Tre agrable. Sed ĉu mi rajtas demandi al Vi ..."

Tiam mi estis interrompita tuj per lia "Oh!": "Bonvolu ne demandi min." Kaj tuj li ekrakontas sian historion, kiun li ŝajne jam centfoje prezentadis: "Ĉar mi estas plenŝtopita!"

"Sed – permesu do!"

La stranga ulo, kiu orgojle fiksrigardas min, ne atentis pri mia objekto, sed senĝene daŭrigas: "Ne ektimu, ĉar mi estas speco de aŭtomato, maŝino en formo de

homo, kvazaŭdirite anstataŭaĵo.

Sinjoro Tobias Hull vere ekzistas. Li estas la estro de granda fabriko por produktado de mekanikaj similuloj. Mi estas, kiel oni diras, projekcio, nome propaganda agento. Memkompreneble mi ne povas klarigi al vi mian mekanismon detale ĉar, vi komprenu: ĝi estas sekreto de produktado! Sed kiam vi imagas al vi, ke plej multaj homoj hodiaŭ tute ŝablonmaniere vivadas, agadas kaj pensas, tiam vi komprenos tuj, sur kio baziĝas nia teorio! Koro kaj racio ĉe ni estas eliminataj. Ili ja estas tiuj, kiuj en la vivo tiel ofte elvokas ĝenajn komplikaĵojn. Ĉe ni la rutino ĉion anstataŭas. Tre evidente, ĉu ne?

Mi konfuzo kajjesis.

"Oh! Mia interno estas sistemo de elektraĵoj kurentoj, aŭtomataj leviloj, grandioza! Konstruktio de antenoj, kiu reagas je plej subtilaj vibradoj. Ĝi igas min plenumi ĉiujn funkciojn de homa estaĵo, direkti en certa maniero eĉ ankoraŭ plion. Vi vidas mem, kiel bone mi funkcias."

Dubante, malfide mi rigardas la strangan kreitaĵon. "Neeble!" mi diras. "Truko de prestidigitado. Eksterordinare. Sed tamen –"

"Oh! Mi povas interkompreniĝi en sep lingvoj. Kiam mi ekzemple turnas la plej supran butonon de mia veŝto, mi parolas flue la anglan, kaj kiam mi tuŝas la sekvan butonon, tiam mi parolas flue la francan, kaj kiam mi ..."

"Tio estas vere miriga!"

"Oh! En certa maniero jes; sed antaŭ ĉio ĝi estas agrable. Ĉu vi deziras babiladon pri la vetero, pri filmo, pri sporto? Pri politiko aŭ abstrakta pentrado? Preskaŭ ĉiuj temoj kaj vortoj de la moderna homo

disponeblas en mi. Ankaŭ bobeno kun banalaj diraĵoj estas elvolvebla. Ĉio sencoplena, komforta kaj praktika. Kiel agrable estos por vi, se vi eble tenos mekanikan sozion de vi – aŭ pli bone, se vi disponas tuj eĉ du ekzemplerojn de vi. Vi povus samtempe entrepreni diversajn profesicelajn vojaĝojn, partopreni plurajn konferencojn, esti ĉie vidata, kaj krom tio mem sidi trankvile hejme. Vi havas anstataŭanton de via mio, kiu verŝajne plenumas viajn negocojn pli bone ol vi mem. Vi lukros la duoblon kaj povas protekti vian personon antaŭ multaj nenecesajoj de la vivo. Via naturo estos multobligita. Vi povas eĉ morti, sen ke la mondo rimarkas tion. Ĉar ni aŭtomatoj deduktas nian ekzistadon el ĉiu renkonto kun veraj homoj."

"Sed tiam la homoj iom post iom ja iĝos tute superflujaj."

"Ne. Ĝuste pro la menciita kaŭzo ne. Du homaj aŭtomatoj povas nur malmulte entrepreni ion kun si mem. Ĉu vi do havas mendon por mi?"

Kun abrupta ekskuo la estaĵo eksaltis kaj kuregis en mia ĉambro tien kaj reen.

"Oh! Ni povas ankaŭ reguligi la rapidecon. Famaj konkursstiristoj kaj vetkurantoj jam tenas por si aŭtomatajn soziojn, kiuj konstante plialtigas siajn rekordojn. "Grandioze! Oni preskaŭ ne scias, ĉu oni havas antaŭ si homon aŭ aŭtomaton."





Vespero omaĝe al Tone Logar

Fani Rižnar

"Oh!", siblis ĉe mia orelo, "la lastan sekreton de la naturo ni neniam deĉifros. – Ĉu mi do rajtas komisi la produktadon de duplikato de vi? Vi ne estas aparte komplike kunmetita, tio estas avantaĝo. La investota kapitalo certe estos profitiga. Morgaŭ venos sinjoro kaj prenos la mezurojn.

La provo de via ekzisto estis fakte perpleksiga, sed ... " Mankis al mi la vortoj, kaj mi ŝajnis kvazaŭ mi pripensus.

"Tamen diru al mi ankoraŭ: Ĉu la sinjoro, kiu morgaŭ laŭanonce venos, estas aŭtomato aŭ reala homo?"

"Mi supozas, ke ankoraŭ vera homo. Sed tio estus egala. Bonan tagon."

Sinjoro Tobias Hull estis for. Pri imago ne estas parolende, la sekretariino estas mia atestantino. Sed la ĝentilula kreaĵo certe estis trafita de io tuj post sia vizito ĉe mi, ĉar nek dum la sekvanta, nek dum iu ajn el la postaj tagoj, venis iu por preni mezurojn por mia similulo. Sed mi esperas per tiuj ĉi linioj direkti la atenton de la Tobias-Hull-asocio denove al mia persono.

Ĉar tion mi scias certe ekde la tiama interparolado: Mi renkontis intertempe multajn homojn, en la teatro kaj en la kinejo, dum kunvenoj kaj societaj eventoj, en la klubo kaj ĉe la kutimtablo, kiuj certe ne estis ili mem, sed jam iliaj similuloj.



HERMANN KASACK estas germana verkisto kaj poeto (Potsdam, 24-a de julio 1896 - † Stuttgart, 10-a de januaro 1966). Studis ekonomion kaj literaturhistorion en Berlino. Unu el la fondintoj de la germana PEN-centro (1948) kaj membro de Akademio de sciencoj kaj literaturo en Mainz. Lia plej konata verko estas la unua romano "La urbo malantaŭ rivero" (Die Stadt hinter dem Strom), aperinta en 1947 kaj premiita per premio "Fontane" en 1949. Lia dua kaj la lasta romano "La granda reto" (Das große Netz) aperis en 1952. Inter 1953 kaj 1963 li estis prezidanto de Germana akademio pri lingvo kaj poezio. Tiun funkcion li forlasis preskaŭ tute blinda en 1963 kaj mortis en sia loĝejo en Stuttgart tri jarojn poste.*



La 19-an de septembro 2013, en la Biblioteko Maks Samsa en Ilirska Bistrica (Slovenio) estis organizita la programo dediĉita al **TONE LOGAR** (1913-1994), unu el gravaj slovenaj kaj jugoslavaj esperantistoj, kiu naskiĝis en Vrbovo ĉe Ilirska Bistrica, okaze de la 100-a datreveno de lia naskiĝo.

La ĉeestintoj rememoris ankaŭ la Esperanto-societon en Ilirska Bistrica, fonditan antaŭ 55 jaroj, la 9-an de februaro 1958, kaj babilis pri la societo kun la iamaj societanoj.

En la programo partoprenis: s-ro Vili Gombač el Societo por loka historio kaj kulturo, s-roj Janez Jug kaj Janez Zadravec el Slovenia Esperanto-Ligo, s-ino Erna Volk, la iama societano de Esperanto-societo Ilirska Bistrica kaj aliaj.

La aranĝon plivigligis la ekspozicio pri Esperanto, pri la agado de Esperanto-societo de Ilirska Bistrica kaj pri esperantisto Tone Logar, kun dokumenta materialo el lia postlasaĵo.

En la kultura programo prezentiĝis Luka Žgur per la diatona akordiono kaj Tomaž Longyka per fragmentoj de poemoj de France Prešern tradukitaj de Tone Logar.

La biblioteko estis plena je partoprenantaj esperantistoj el Ljubljana, Triesto (Italio) kaj Ilirska Bistrica, sed ne mankis ankaŭ neesperantistoj.

NEVIDANTAJ ESPERANTISTOJ ĈE LA NIGRA MARO

Antun Kovač

En la pitoreska bulgara urbeto *Obzor*, unu el la plej malnovaj loĝigitaj lokoj en la bulgara nigramara regiono, kolektiĝis nevidantaj esperantistoj en sia ĉi-jara *79-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj* (IKBE). Per organizado de ĉi tiu aranĝo, la bulgaraj nevidantaj esperantistoj jam la kvinan fojon gastigis siajn samideanojn, organizitajn en *LIBE* (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj). La 79-a IKBE okazis inter la 28-a de aŭgusto kaj 3-a de septembro en la hotelo "Horizont", kaj la organizanto estis *ANEB* (Asocio de Nevidantaj Esperantistoj

de Bulgario). En la kongreso partoprenis 72 esperantistoj kaj iliaj akompanantoj el 11 landoj, sed duono el ili estis bulgaroj mem. La delegitaro de *Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj* konsistis el nur du membroj - la prezidanto kaj la sekretario de la Unuiĝo.

La malfermo de la kongreso okazis en la posttagmezaĵ horoj, jaŭde, la 29-an de aŭgusto. Partoprenis ĝin prezidanto de la Bulgara Asocio de Nevidantoj *Vasil Dolapĉiev*, reprezentanto de bulgaraj esperantistoj *Nikola Uzunov* kaj anstataŭantino de la urbestro de Obzor. Dum kvin labortagoj la

partoprenintoj okazigis tri kunsidojn kaj aŭskultis 8 prelegojn. Prelegis *Veselina Stoilova*, *Vasil Dolapĉiev* kaj *Mariana Evlogieva* el Bulgario, *Antun Kovač* el Kroatio, *Norbert Markus* el Hungario, *Julia Korjak* el Germanio, *Nedeljka Ložajić* el Serbio kaj *Kunio Tanabe* el Japanio. "Nevidantoj en la civila socio" estis la ĝenerala kongresa temo, al kies enhavo komplete adaptiĝis la referaĵo "Ĉu kroataj nevidantoj estas egalrajtaj civitanoj" de *Antun Kovač*.

Enkadre de la kongreso okazis ankaŭ regula elekta jarkunveno de *LIBE*, dum kiu estis

INTERNACIA SEMINARIO AEPa 2013 OKAZIS EN KARLOVO

Surbaze de personaj memoroj kaj raportoj de Boĵidar Leonov la artikolon preparis Zlatko Hinšt

En la bulgara urbo *Karlovo* inter la 29-a de junio kaj la 4-a de julio 2013 okazis la 5-a Internacia Seminario "*Apliko de Esperanto en Profesia Agado*" (AEPa) sub aŭspicio de d-ro *Emila Kabaivanov*, la urbestro de Karlovo. La ĉefa organizanto de la seminario estis profesoro de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino kaj prezidanto de AIS-Bulgario kaj de Bulgara Esperanto-Asocio *Boĵidar*

Leonov. Ĉi-jare estas festata 150-jara naskiĝdatreveno de la elstara bulgara sciencisto, literaturisto kaj filologo *Ivan Ŝiŝmanov*, kiu estis omaĝita dum la seminario. La solena inaŭguro okazis en la Urbodomo, kaj ĝin ĉeestis reprezentantoj de ŝtataj, regionaj kaj lokaj instancoj, interalie la unua vicurbestro de Karlovo *Anton Minev*, ĝenerala sekretario de Federacio de Scienc-teknikaj Asocioj en Bulgario

Martin Antonov, eksterlandaj gastoj, kies elstara reprezentanto estis profesoro kaj akademiano de Sveda Akademio de la Sciencoj kaj AIS San Marino *Christer Oscar Kiselman* kaj enlandaj gastoj, ekz. membroj de Bulgara Akademio de la Sciencoj je kies nomo salutis profesorino *Rumjana Damjanova*, samtempe membrino de Nacia Organiza Komitato por festo de la datreveno de *Ivan Ŝiŝmanov*, kaj



elektita nova estraro por sekva kvarjara mandato, estis akceptita raporto pri aktivecoj en la pasinta mandato kaj financa raporto, prezentitaj mallongaj raportoj pri laboro de landaj Esperanto-asocioj, kaj diskutite pri kelkaj aktualaj temoj el la laboro de LIBE kaj ĝiaj membro-asocioj. Kiel nova prezidanto de LIBE estas elektita **Anatolij I. Masenko** (Rusio), kiel vicprezidanto **Natalia Kasymova** (Germanio), kiel unua sekretario **Olena Pošivana** (Ukrainio), dua sekretario **Dragan Štoković** (Kroatio), kasisto reelektita **Pier-Luigi Da Costa** (Italio), dum novaj konsilantoj estas **Nedeljka Ložajić** (Serbio) kaj **Dimo Dimov** (Bulgario).

Antaŭ la nevidantaj esperantistoj en la sekva jaro estas du gravaj jubileoj: la 80-a kongreso

kaj 110-a datreveno de *“Esperanta ligilo”*, organo de LIBE. Kie la jubilea kongreso okazos, ankoraŭ ne estas konate, ĉar dum la jarkunveno kandidatiĝis oficiale neniu organizaĵo. **Višnja Branković** el Kroatio, vidanta esperantistino kiu ankaŭ partoprenis la kongreson, kaj kiu posedas agentejon por organizado de internaciaj aranĝoj *“Orbis Pictus”* en Triesto, ofertis siajn servojn por eventuala organizado de la kongreso. Kurso de Esperanto kiun gvidis **Natalia Kasymova**, kaj por komencantoj **Pier-Luigi Da Costa**, estis valora programero de ĉi tiu, samkiel de antaŭaj kongresoj. Ni menciu ankoraŭ la duontagan ekskurson al *Nesebar*, unu el malnovaj urboj ĉe la nigramara bordo, kie la partoprenintoj, helpe de faka gvido de kustoso de la arkeologia

muzeo, konatiĝis kun la historio de la urbo kaj valoraj eksponaĵoj el ĝia malkvieta kaj longa historio. El la programeroj organizitaj dum vesperaj horoj ni elstarigas: la vesperon dediĉitan al la verko de poeto-esperantisto **Nikola Uzunov**, kiu mem partoprenis la kongreson, la Nacian vespero kun bulgaraj popolokantoj kaj dancoj, la Internacian vesperon dum kiu la kroata delegacio prezentis soneldonon de la libro *“Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić”* en Esperanto, kiun komune eldonis **KUNE** kaj **UZE**. Por la fino de ĉi tiu raporto mi ripetos mian takson de la kongreso, kiun mi eldiris ĉe ĝia fermo: ĝi estis la plej sukcesa el la tri bulgaraj IKBE-oj kiujn mi partoprenis ekde 2000. Du aliaj okazis en Sofio kaj 1978 en Varno.

membrino de AIS Bulgario **Eva Bojaĝieva**. Solene inaŭguris la seminarion **Bojidar Leonov** kaj la estimataj gastoj. Siajn salutleterojn sendis la eksaj UEA-prezidantoj profesoroj **Renato Corsetti** kaj **Probal Dasgupta**, profesoroj de AIS San Marino **Hans Dieter Quednau** kaj **Alicja Lewanderska-Quednau** kaj aliaj. Estis menciitaj meritoj kun agnosko al **Bojidar Leonov** por dek jaroj de gvidado de AIS Bulgario kaj sukcesa laboro en aliaj funkcioj en Esperantaj kaj scienc-teknikaj organizoj. **C. O. Kiselman** fariĝis honora membro de AIS Bulgario.

Dum la unua seminario tago plimulto da tempo rilatis al nacilingvaj prelegoj de bulgaraj profesoroj kaj akademianoj **Rumjana Damjanova**, **Kiril Topalov**, **Sava Sivriev**, **Plamen Antov**, **Marian Nedelev**, **Maria Mladenova**, **Nedka Kapralova**, **Cecka Veličkova** kaj aliaj, tradukitaj al Esperanto de membro de AIS Bulgario **Nikola Uzunov**. Esperantlingve prelegis **Bojidar Leonov** pri "La ideoj de Ivan

Ŝiŝmanov pri apliko de Esperanto kiel kontaktingvo inter la sciencularo realigitaj per agado de AIS" kaj **Ljubčo Trifonĉovski** pri "La kontaktoj kaj kunlaboro inter profesoro Ivan Ŝiŝmanov kaj Atanas D. Atanasov". La duan tagon sekvis ankoraŭ kelkaj nacilingvaj prelegoj tradukitaj de **N. Uzunov**.

Dum la dua tago, en la dua parto de la programo, estis kelkaj Esperantlingvaj prelegoj. Profesoro **Kiselman** prelegis pri problemoj en geometrio de greka matematikisto **Eŭklido**. Antaŭ ĉi-tiu prelego li anglalingve prelegis en Bulgara Akademio de la Sciencoj en Sofio ankaŭ kiel ĝia gasto. Prezidanto de Rumana Esperanto-Asocio kaj membro de ILEI kaj AIS **Mihai Trifoi** prelegis pri siaj instruistaj spertoj en Esperanto. **Johan Derks**, nederlandano, nun loĝanto de la Serbio, prelegis pri Esperanto-reguloj surbaze de la Fundamento de L. L. Zamenhof pri lando- kaj etnomoj por pluraj kazoj. **Nikola Uzunov** prelegis pri problemoj de neologismoj en

Esperanto. Docento de AIS San Marino, d-ro **Zlatko Hinšt**, prelegis pri "Socia respondeca negocado kaj daŭrigebleco" ekspozinte la temon kiel koncernajn teoriajn kaj oficialajn difinojn el kroataj kaj eŭropaj (EU) dokumentoj kaj praktiko, plejparte je la ekzemplo de Respubliko Kroatio enkadre de la aprobata koncepto de daŭrigebla evoluo. Partoprenis per aŭskultado de la programo, fotis kaj diskutis **Nebojša Stanković** kaj **Snežana Milanović** el Serbio kaj **Martin Ebner** el Germanio. Krom tio, okazis ekskurso al apuda urbeto Sopot. Je la fino de la seminario AEPA, la 2-an de julio, okazis gazetara, radia kaj televida konferenco por lokaj mediatoj. Prezentis sian laboron **Bojidar Leonov**, **Christer O. Kiselman**, **Johan Derks**, **Mihai Trifoi** kaj **Zlatko Hinšt**. Post la seminario okazis dutaga religia seminario sub la titolo *“Teologio”*, pri la rolo de apartaj religioj en kulturo kaj edukado por obei la principojn de religiaj etiko kaj moralo.

ĈU KROATAJ NEVIDANTOJ ESTAS EGALRAJTAJ CIVITANOJ?

Mian referaĵon mi povus tuj fini, respondante per “ne” al la demando starigita en la titolo, ĉar la nevidantoj mem en Kroatio opinias, ke ili ne estas egalrajtaj civitanoj, kion en ĉi tiu referaĵo mi ankaŭ pruvos. Sed la referaĵon mi ne finos pro minimume du kaŭzoj: unue, ĉar la kongresa organizanto disponigis al mi dudekon da minutoj, kaj do mi eluzos tiun okazon, kaj due, ĉar en la 14a artikolo de la Konstitucio de Kroatio estas skribite: “Ĉiuj laŭleĝe egalrajtas”. Ĉi tiu konstitucia preskribo rilatas la protekton de fundamentaj homaj rajtoj kaj liberecoj. Kaj la menciitaj ĈIUJ, kiuj rilate la fundamentajn rajtojn kaj liberecojn laŭleĝe egalrajtas, estas la civitanoj, senkonsidere pri sia raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia konvinko, nacia aŭ socia deveno, posedaĵo, naskiĝo, eduko, socia rango kaj aliaj karakterizaĵoj.

La nevidantaj personoj opinias, ke la menciita konstitucia preskribo nekomplete aplikigas rilate al iliaj fundamentaj rajtoj. Nome, ekde la komenco de funkciado de la kroata ŝtato, respektive ekde 1991, iliaj rajtoj, ĝis tiam akiritaj, reduktiĝis kaj kelkaj el ili eĉ nuliĝis. Devis pasi konsiderinda tempo ĝis kiam Kroata unuiĝo de nevidantoj, per persista pledado kaj luktado, iujn el tiuj rajtoj sukcesis rehavigi, kvankam sen la fundamenta rajto, pri kies rehavigo dum plenaj dudek jaroj ĝi persiste klopodis. Temas pri la rajto je krompago por blindeco, kiu antaŭe estis nomata “la rajto pri krompago por aliula helpo kaj flegado”.

La rajto pri krompago por helpo kaj flegado al nevidantaj

 Antun Kováč

La 15-a de oktobro estas solenata kiel la internacia Tago de la blanka bastono, proklamita en 1993 fare de Eŭropa Unio de Nevidantoj (EBU). La celo de la solenado estas proksimigi al la socio problemojn de la malbone vidantaj kaj nevidantaj homoj.

uzantoj, jam ekde la komenco de funkciado de la memstara ŝtato Kroatio komencis draste reduktiĝi rilate la nombron de ĝiaj uzantoj kaj rilate la krompagan sumon, sed kio ankoraŭ pli gravas, ankaŭ rilate la sistemon en kiu ĝi efektiviĝas. Krompago por helpo kaj flegado al nevidantaj personoj kiel laŭleĝa rajto estis agnoskita en la jaro 1959 per la Leĝo pri invalida asekuro. Komence realigis ĝin nur la dungitaj nevidantoj, sed poste la proceduro vastiĝis ankaŭ al aliaj uzantoj, kaj ĝi efektiviĝis en pluraj sistemoj, ekz. en la invalida asekuro, socia protekto kaj aliaj, sed mi evitos pliampleksigi la temon.

Kroata unuiĝo de nevidantoj, kiel tegmenta organizaĵo de ĉiuj nevidantoj, ekde la komenco atentigis pri tiu

ĉi problemoj kaj postulis, ke la akiritaj rajtoj de nevidantoj ne estu nuligitaj. Tiucele ĝi donis konsiderindan kontribuon per siaj iniciatoj, proponoj, eksplikoj kaj klopodoj, sed speciale celante ke la rajto je krompago pro blindeco, kiu ĉiukaze estas unu el la plej gradaj civilizaj heredaĵoj, estu kiel eble pli bone komprenata flanke de la ŝtataj organoj, akceptata kaj efektivigata.

Kroata unuiĝo de nevidantoj atentigis la ŝtatajn organojn ke blindeco estas unu el la plej malfacilaj formoj de handikapo, kaj ke nevidantaj kaj surblindaj personoj bezonas konsiderindan monhelpon, por ke ili povu almenaŭ parte kontentigi siajn specifajn bezonojn kaŭzantajn ĝuste per blindeco. Sed, eĉ ĝis nun ne videblas pli granda progreso. Ĉi-momente iu registara grupo laboras super la Leĝo pri inkluziva krompago laŭ la aŭstria modelo kiu, laŭdire, devus solvi krompagon pro grava invalideco por ĉiuj kategorioj de invalidaj personoj, do ankaŭ de nevidantoj. La laborgrupo havas la devon prepari la leĝproponon ĝis la fino de la kuranta jaro, por ke la Leĝo povu aplikigi ekde la 1a de januaro 2014. Kiom konate al mi, la aktivecoj en tiu kampo ne okazas tre rapide, pro kio ĝis la fino de junio estis preparitaj nur tezoj por diskuto pri la Leĝo, el kio sekvas, ke ne estas kredinde ke la Leĝo ekaplikiĝos ekde la planita limdato.

En la aplikado de ankoraŭ unu rajto garantiata per la Konstitucio, la kroataj nevidantoj sentas sin esti en neegalrajta pozicio. Temas pri laborrajto kaj laborlibereco. En la artikolo 54 de la Konstitucio de Respubliko Kroatio esprimiĝas ke “ĉiu havas

la laborrajton kaj laborliberecon” kaj plue ke “ĉiu libere elektas sian profesion kaj laboron kaj al ĉiu sub egalaj kondiĉoj estas disponebla ĉiu posteno kaj ofico.”

Tamen, en la praktiko estis kaj eĉ nun estas tute alie. Jam ekde la jaro 1991 la nevidantoj kaj aliaj handikapitaj dungitoj estis la unuaj trafitoj de nuligo de laborkontraktoj, ĉesigo de laborpostenoj en kiuj ili ĝis tiam sukcese laboris, kaj de deviga invalida emeritiĝo aŭ registriĝo ĉe la laborborso. Ĝis la jaro 1998 la nombro de dungitaj nevidantoj reduktiĝis je 50%, kun la tendenco de plia reduktiĝo.

Mi atentigas ankoraŭ pri unu konstitucia preskribo, kiu ĝis nun nur parte aplikigiĝis en la leĝa reglamento, kaj ĝi estas notita en la dua alineo de la konstitucia artikolo 57 jene: “Specialan prizorgon la ŝtato dediĉas al protekto de invalidaj personoj kaj ilia inkluziviĝo en la socian vivon”. Nur per unu ekzemplo mi montros, ke eĉ tiel bone formulita preskribo ne aplikigiĝas komplete, kaj la ekzemplo rilatas la iniciaton de Kroata unuiĝo de nevidantoj, ke en la Leĝo pri lernolibroj aldoniĝu la preskribo laŭ kiu ankaŭ al nevidantaj lernantoj estu garantiataj lernolibroj en la brajlo. La iniciato ne estis akceptita.

Permesu al mi prezenti ankoraŭ kelkajn starpunktojn el la Deklaracio pri stato de nevidantoj en Respubliko Kroatio, kiun akceptis la Asembleo de Kroata unuiĝo de nevidantoj komence de aprilo 2009, el kiu videblas kia estis la stato de nevidantoj antaŭe, kaj kia ĝi estas nuntempe.

En la komenco de la Deklaracio oni konstatas ke: “Per fondo de Kroata unuiĝo de nevidantoj, la 16an de junio 1946, la nevidantoj de Respubliko Kroatio aktive inkluziviĝis en la kreadon de leĝaj kaj aliaj kadroj kiuj fariĝis firma bazo de ilia digno, egalrajto kaj integriĝo en la socian komunajon.” Kaj vere, Kroata

unuiĝo de nevidantoj, fondante siajn bazajn organizaĵojn dise tra Kroatio, enirante aktive la partnerecon kun la ŝtato, ludis la ĉefan rolon en la procesoj en kiuj dum jaroj plialtiĝis la nivelo de sentebleco de la socio por la bezonoj kaj eblecoj de nevidantaj personoj kaj ilia inkluziviĝo en la sociajn fluojn kiel egalrajtaj civitanoj povantaj transpreni siajn respondecojn kaj taskojn por esti utilaj membroj de la socio. Dank’ al tio realiĝis ĉiam pli granda afirmiĝo de nevidantaj personoj, aparte en la edukado, postenigo kaj en la rezultoj kiuj fontas el okupiĝo pri kulturo kaj sporto.

Progresigon de sia socia stato la nevidantoj povis realigi nur helpe kaj kun komprenemo de ŝtataj institucioj kaj ĉiuj faktoroj de la socia komunajlo kiuj - por la tiamaj cirkonstancoj - sur relative alta nivelo kreis la antaŭkondiĉojn por “egalaj ŝancoj” en unuopaj kampoj kaj ĝenerale en la vivo.

Nuntempe oni akcentas en la Deklaracio ke “resumante la aferon, la prizorgo de nevidantaj personoj en Respubliko Kroatio en la praktika aplikado grave malprogresis. Dum ĉi tiuj ŝanĝoj estis kompreneblaj, kaj al ni, la nevidantoj, akcepteblaj en la tempo de fondo de memstara Respubliko Kroatio, kaj speciale dum la Patrolanda milito kaj defendo de la lando kontraŭ agreso, ne povas esti akceptataj identaj, negativaj tendencoj sekvintaj post tiu malfacila tempo.”

Ekskludante la nevidantojn kaj aliajn invalidajn personojn el la Leĝo pri pensia asekuro el 1999, kaj per ilia inkludo en la sistemon de sociala asekuro, draste reduktiĝis partopreno de la ŝtato en kovrado de kostoj kaŭzigitaj per invalideco. Personoj kun la plej grava invalideco estas lasitaj al prizorgo de si mem kaj de siaj familioj. La zorgo de la ŝtato pri nevidantoj limiĝas al projektoj kaj

programoj kiujn realigas asocioj.

Finfine, per la Deklaracio sendube oni konstatas ke “la stato de nevidantoj en Kroatio estas neakcepteble malfacila kaj diskriminacia.”

Kiel jam dirite, Kroata unuiĝo de nevidantoj estas konstante engaĝita por ke la negativaj tendencoj estu haltigitaj kaj la leĝa reglamento akordiĝu kun la konstituciaj preskriboj. Tiucele estas preparitaj ankaŭ kelkaj leĝproponoj, estis farita detala korespondado kun ministerioj kaj aliaj ŝtataj organoj, en la senperaj kontaktoj kun la plej altaj ŝtataj funkciuloj estis proponitaj starpunktoj kaj proponoj de organoj de Kroata unuiĝo de nevidantoj, samkiel la postuloj de nevidantaj civitanoj, estis organizita subskribado de Peticio por akcepto de Leĝo pri krompago por grava invalideco, kiun subskribis proksimume kvardek mil civitanoj, kaj estis organizitaj ankaŭ kelkaj protestaj manifestacioj en Zagrebo, en kiuj, krom la nevidantoj, partoprenis ankaŭ multaj civitanoj, subtenante iliajn postulojn.

La kroataj nevidantoj do ne estas kontentaj pri sia nuntempa stato en la socio kaj ili opinias, ke ili ne estas egalrajtaj civitanoj.

Ekzistas unuopaj bonaj ekzemploj kie nevidantoj en sia labormedio kaj vivkomunajlo estas afirmataj kaj preskaŭ egalrajtaj kun siaj vidkapablaj kolegoj. Nuntempe ekzistas alte edukitaj nevidantoj dungitaj kiel advokatoj, konsilantoj en ŝtataj organoj, estroj en la organoj de lokaj administracioj ktp., sed same tiel ankaŭ tre granda nombro de nedungitoj, same alte edukitaj nevidantaj personoj, kiuj pri egalrajteco povas nur revii. Antaŭ Kroata unuiĝo de nevidantoj estonte staras multaj aktivecoj por ke estu akirita egalrajteco por ĉiuj nevidantaj civitanoj, kaj tio ĉi ankoraŭ, bedaŭrinde, ne okazos tiel rapide kiel ni volus.

NEALTRUDE, SED EFIKE! Franjo Forjan

La 21-an kaj 22-an de septembro, honore al Tago de la urbo, **Bjelovara Esperantista Societo** organizis la bone vizititan aranĝon **“Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo”**, kiun partoprenis pli ol 70 geesperantistoj el diversaj partoj de Kroatio. La programo estis pli kultura ol manifestacia aŭ turisma, kaj ĝi elvokis relative grandan interesiĝon ĉe la loĝantaro de Bjelovar kaj ĉe la lokaj mediatoj kaj institucioj, do ekster la nuraj esperantistaj rondoj. La aranĝo, kiu estis parto de pli ampleksa urba programo, kaj anticipis la urban feston, okazantan la 29-an de septembro, jam tradicie ricevis ĉiaspecan subtenon de la urbestro **Antun Korišec**, kiu elstarigas la esperantistan agadon kiel ekzemplan.

La programo konsistis eĉ el kvar ekspozicioj. Tri el la menciitaj ekspozicioj okazis en la jam kutima ekspozicia loko por bjelovaraj esperantistoj - la **Popola biblioteko “Petar Preradović”**.

Tie prezentiĝis la bjelovara esperantisto kaj filatelisto **Željko Saks**, kiu ekspoziciis parton de sia tre riĉan kolekto de malnovaj bjelovaraj bildkartoj. Lia ekspozicio **“Promeno tra mia urbo”** estis starigita en la vitrinoj de la ĉefa koridoro de la biblioteko. Alia bjelovara esperantisto, **Berislav Rubčić**, estas tre konata foto-artisto, laŭreato de fotopremio **“Tošo Dabac”**, la plej prestiĝa fotopremio en Kroatio. Li prezentis siajn fotojn en la ekspozicio **“La montetoj de Zagorje”**, kiu plenigis la vitrinojn en la unua etaĝo de la biblioteko. La tria ekspozicio titolita **“La vojaĝkronikisto Tibor Sekelj”**, preparita de **Josip Pleadin**, per libraj, fotaj kaj tekstaj materialoj el **Dokumenta Esperanto-Centro** rememorigis pri la 25-a mortodatreveno de la fama esperantisto kaj esploristo. Ĉiuj tri ekspozicioj en la Popola biblioteko estis viziteblaj inter la 14-a de septembro kaj 9-a de oktobro. La ĉefa ceremonio, dum kiu parolis

la biblioteka direktoro **Marinko Iličić**, la urbestro de Bjelovar **Antun Korišec** kaj la tri aŭtoroj, okazis la 22-an de septembro. Por ĉiuj ekspozicioj estis preparitaj modestaj katalogetoj, da kiuj oni devis presi trifoje novan kvanton, pro la evidenta grandega interesiĝo de la vizitantoj.

La kvara, sed certe la plej nekutima ekspozicio, estis organizita en la kulta loko de bjelovaraj esperantistoj, la dolĉaĵejo **“Zagorje”**, posedata de s-ro **Božidar Zagorec**. En lia dolĉaĵejo estas la stabo de bjelovaraj esperantistoj, kiuj ankoraŭ en havas sian propran sidejon, kaj tre ofte uzas la agrablan ambienton de la dolĉaĵejo por siaj kunvenoj. La ekspozicio tie starigita havas la titolon **“Azia paletro”** kaj prezentas 25 verkojn de korea pentristo-esperantisto **Ho Song**, ĉefe olepentraĵojn sur tolo. La malfermo okazis la 21-an de septembro kun partopreno de pluraj esperantistoj kaj bjelovaranoj, kaj la simblan malfermon per sia parolado faris

Kunvojaĝu al la 7-a Mezorianta Kunveno en Tbilisi, aprile de 2014

Ĉi-aŭtune **Orbis Pictus** de Višnja Branković estas preparanta partoprenojn kaj kunvojaĝojn al gravaj Esperantaj aranĝoj en 2014. La unua, komence de printempo, gvidos la jam ekformiĝantan grupeton al Meza Oriento, en Kartvelion. En ĝia ĉefurbo **Tbilisi** okazos la **7-a Mezorianta Kunveno**, de la 5-a ĝis la 10-a de aprilo. Kiel kutime, la lokaj organizantoj proponas al interesitoj ankaŭ aldonan eksterkunvenan turisman vizitadon de la lando. Estas ebleco ekflugi ankaŭ el Zagrebo kaj flekseble decidi pri daŭro de sia restado en Kartvelio / Meza Oriento. Bonvenu ankaŭ vi! Atendas vin vere interesa mezorianta lando, prelegoj kaj kulturaj programoj, speciala familia etoso de la kunveno, bonaj surlokaĵoj prezoj ... **Orbis Pictus** akceptas limigitan nombron da grupanoj, ĝis la jarfino de 2013.

Pliajn informojn petu, prefere rete je: orbispictus@iol.it
aŭ poŝtefone je + 385 / 99 50 11 912 .

Eŭropa tago de lingvoj

La 26-an de septembro oni celebras **Eŭropan tagon de lingvoj**. Okaze de tio, **Radio Terezija** en Bjelovar intervjuis prezidanton de Bjelovara Esperantista Societo **Franjo Forjan** kaj sekretarion de Dokumenta Esperanto-Centro **Josip Pleadin** pri Esperanto. La 22-minuta intervjuo estis elsendita dufoje: la 25-an kaj 26-an de septembro.



la urbestro **Antun Kurušec**. La ĉeestintojn salutis la prezidanto de Bjelovara Esperantista Societo, s-ro **Franjo Forjan**, la programan ceremonion gvidis la sekretariino **Grozdana Grubišić-Popović**, kaj pri la pentristo parolis **Ljerka Stilinović**. Aldonan artan noton al la programo donis profesoro **Zdravko Seleš** el Đurđevac, parolinte pri siaj orientaj rememoroj kaj leginte siajn tiutemajn poemojn. Ĉe la fino, la ĉeestintoj alparolis ankaŭ s-ro **Božidar Zagorec**, kiu esprimis sin tre honorigita per ekspozicio de la pentraĵoj el tiel malproksima lando kia estas Suda Koreujo. Favore pri la ekspozicio sin esprimis la **Ambasado de Respubliko Koreujo en Zagrebo**, kiu disponigis al la organizantoj KD-ojn kun tradicia korea muziko. La muziko kompletigis la etoson de la ekspozicio, kaj pri la teknika parto zorgis **Nenad Margetić**. Por la ekspozicio estas preparita speciala katalogo kaj oni povas vidi la ekspozicion ĝis la 20-a de oktobro. La eventon filmis **Kroata televido**.

La ĉefa tago de la programo estis dimanĉo, la 22-a de septembro. Tiutage al Bjelovar venis pli ol 70 aliurbaj geesperantistoj. Unue ili haltis antaŭ la loka gimnazio, sur kies muro staras la memortabulo al **Željko Sabot**, la forpasinta bjelovara poeto, kiu estis ankaŭ esperantisto. Pri la poeto inspire parolis profesoro **Zdravko Seleš**, post kio la gastoj vizitis la tri ekspoziciojn en la Popola biblioteko. La ekspozicion pri Tibor Sekelj trafe kompletigis la solena prezo de lia plej nova libro **“Padma, la eta dancistino”**, kiu okazis en la salono sur la unua etaĝo de la Popola biblioteko. En la programo, kiun gvidis profesoro **Zdravko Seleš**, partoprenis ankaŭ **Josip Pleadin** (la eldonisto de “Padma”) kaj **Grozdana Grubišić-Popović**, kiu legis la recenzan tekston de ĉina esperantistino **Yu Jianchao**. La libroprezenton riĉigis ankaŭ foto-projekcio pri Tibor Sekelj.

Specialan atenton dum la tuta aranĝo la organizantoj donis al junaj membroj de esperantista komunumo de Kroatio, respektive

al lernantoj de elementaj kaj mezaj lernejoj, kiuj recitis originalan Esperantan poezion kaj poemojn de kroataj verkistoj tradukitajn en Esperanton. Tiun parton oni titoligis **“Deklamkonkurso”**, kaj partoprenis dek unuopaj aŭ grupaj deklamantoj. La deklamkonkurso estis organizita kune kun **Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto** (UPE) el Zagrebo, kaj la programon gvidis ĝia prezidantino **Marija Jerković**. La unuan premion (kaj specialan pokalon) gajnis la duopo **Ana Lulić** kaj **Arijana Tkalčec** el Gimnazio de d-ro Ivan Kranjčev el Đurđevac per deklamado de “Siberia lulkanto” de Julio Baghy. La duan premion (kaj respektivan medalon) ricevis **Marija Vešnik** el Elementa lernejo “Mladost” el Zagrebo per poemo “Longe dum nokt’” de Dragutin Tadijanović, kaj la trian premion (kaj respektivan medalon) la duopo **Sara Ljubaj** kaj **Katarina Kocelj** el Elementa lernejo “Davorin Trstenjak” el Zagrebo per “Al vendejo urso iris”. Estis aljuĝitaj ankoraŭ du aldonaj premioj: al **Franka Murtić** el Elementa lernejo Rab por “Poezio” de Lucija Borčić, kaj al triopo **Sara Ljubaj**, **Katarina Kocelj** kaj **Leda Brigljević** el Elementa lernejo “Davorin Trstenjak” el Zagrebo por “Bela estas Zagonjan la verda”.

Komunan foton oni faris ĉe la pavilono en la urba

parko, kaj poste, akompanitaj per preskaŭ printempe bela kaj varma vetero, promenante tra la urbo, ĉiuj direktiĝis al la dolĉaĵejo “Zagorje” por viziti la ekspozicion de **Ho Song**. La grupo restis en la ekstera teraso de la dolĉaĵejo dum pli ol unu horo, ĝuante la leĝeran konversaciadon kaj gustumadon de kukoj, trinkaĵoj kaj glaciaĵoj.

Daŭrigo de la programo okazis en la Hotelo “Central”, kie la deklamantoj ricevis siajn premiojn, kaj ĉiuj aliaj partoprenintoj de la deklamkonkurso diplomojn kaj librojn. En mallonga kanta kaj danca programo prezentiĝis la infana grupo gvidita (kaj akordione akompanita) de instruistino **Silvija Fostač** el Zagrebo. Pri la noveldonita libro **“La Tilia Urbo”** de forpasinta esperantistino **Marija Horžinek** el Petrinja (eldonita de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj, kaj kuneldonintoj Bjelovara Esperantista Societo kaj Esperanto-societoj el Petrinja kaj Sisak), parolis la tradukinto **Josip Pleadin** kaj ĉapitron el ĝi legis profesoro **Zdravko Seleš**. Pri aliaj eldonaj projektoj de UZE parolis la prezidanto **Radenko Milošević**. Li menciis la kvarvoluman kroatlingvan memuarverkon de UZE-membro **Nikola Turk “Tri ostetoj - kvarono da karno”**, kiu antaŭ nelonge eldoniĝis. Al ĉiuj ĉeestintoj estis disdonita la 23-a numero de **“Zagreba Esperantisto”**, aperinta antaŭ la aranĝo, kaj bildkartoj de Bjelovar, donacitaj de la urba **Turisma asocio**.

Pri la aranĝo aperis kelkaj artikoloj en la regiona gazetaro kaj, instigita de la evento, **Radio Terezija** invitis la esperantistojn al speciala 22-minuta elsendo pri Esperanto, lige al Eŭropa Tago de la lingvoj (26-a de septembro).

La bjelovara ekzemplo estas la ĝusta maniero kiel oni devas agi inter neesperantistoj: nealtrude, sed efike. Samtiel, la ekzemplo de Bjelovar povas estis vojontra ankaŭ por ĉiuj aliaj kroataj societoj: oni devas konstante aktivaj kaj eĉ en malfacilaj tempoj organizi programojn kiuj kunigos nin kaj progresigos la Esperanto-movadon en Kroatio.



Esperantistoj de B



1



4



3




5



1) Gajnintoj de la unua premio kaj pokalo en la Deklamkonkurso;
2) Projekcio pri Tibor Sekelj kaj prezento de "Padma, la eta dancistino";
3) Malfermo de la ekspozicio "Azia paletro" de Ho Song (de maldekstre: Ljerka Stilinović (sidas), Groždana Grubišić-Popović kaj Franjo Forjan); 4) Publiko dum malfermo de la ekspozicio de Ho Song; 5) Esperantistoj promenas en la korsio de Bjelovar; 6) La urbestro de Bjelovar Antun Korušec malfermas la ekspozicion de Ho Song.

Bjelovar al sia urbo

 Jozo Lovrić



6



11



7



9



12



8



10



13

7) La infana grupo el Zagrebo kantas kaj dancas; 8) Malfermo de ekspozicio "Promeno tra mia urbo"; 9) Ekspozicio pri Tibor Sekelj; 10) La urbestro Antun Korušec en la ekspozicio "La montetoj de Zagorje"; 11) Profesoro Zdravko Seleš prezentas la libron "Padma, la eta dancistino"; 12) En la dolĉaĵejo "Zagorje"; 13) Marija Vešnik, la due premiita en la Deklamkonkurso kun Marija Jerković kaj Franjo Forjan.

KELKAJ NOVAĴOJ PRI ESPERANTO-BIBLIOTEKOJ

 Roland Rotsaert

Kvankam ekzistas Google-listo 'bibliotekoj', ne estas iu loko en kiu ĉiuj informoj pri Esperanto-bibliotekoj estas grupigitaj. Jen kelkaj novaĵeroj kiujn mi el diversaj lokoj kolektis, kaj kelkaj informoj pri projektoj al kiuj mi persone estas ligita.

Endanĝerigitaj kolektoj

En okcidenta Eŭropo kelkaj Esperanto-bibliotekoj ne plu estas alireblaj aŭ devos restrukturiĝi sin, sed estas esperigaj signal(et)oj.

Kortrijk (Belgio)

La *Esperanto-Fondaĵo Cesar Vanbiervliet* en Kortrijk havas la statuson de "fondaĵo" aŭ "fonduso" de la urba biblioteko. Tio estas (en Belgio) bibliotekista jargono, leĝe ne difinita, sed tamen

konsiderata sekura. La urbestro de Kortrijk antaŭ kelkaj jaroj mendis analizon de siaj kulturaj instancoj kaj unu el la konkludoj de tiu analizo estas ke la *Fondaĵo Vanbiervliet* (kaj kelkaj aliaj historiaj librokolektoj) ne estas esencaj por la kortrijka kulturo kaj sekve, ke ne plu estu loko por ili en la urba biblioteko. La antaŭa urbestro konfirmis tiujn konkludojn; la nova, elektita antaŭ unu jaro, ankoraŭ ne klare esprimis sin sed verŝajne ne inversos la decidon.

La *Fondaĵo Vanbiervliet* certe ankoraŭ dum kelkaj jaroj restos en la urba biblioteko. La provinco planas centran stokejon kie estu grupigitaj muzeo- kaj librokolektoj kiuj pro iu kialo perdis sian "hejmon" kaj en ĝi estos loko por la *Fondaĵo Vanbiervliet*. Alia solvo, eble preferinda, estus translokiĝo de la fondaĵo al Antwerpen, en

la aĉetota nova sidejo de Flandra Esperanto-Ligo.

La situacio instigos la prizorgantojn por pli racie mastrumi la kolekton: ne plu akcepti ion ajn, forigi pluroblajn erojn, ktp. La laboro komence de 2013 estis bremsita pro renovigo de la publikaj partoj de la biblioteko, kiu daŭris plurajn monatojn. Nun ĉio denove normale funkcias kaj estas espero je iom pli da teknika subteno de la urba biblioteko (ĉefe la instalado de pli fidinda retaliro).

Saint-Omer (Francio)

Saint-Omer estas nord-franca urbeto, inter Boulogne-sur-Mer (kie okazis la unua UK) kaj Lille (kie en 2015 okazos la centa UK). Inter la mondmilitoj tie estris la urban bibliotekon esperantisto Ernest Deligny. En 1938 li donacis Esperanto-kolekton (fakte parton de sia propra kolekto) al la urba biblioteko. En 1942 li presigis ĝian katalogon (kiun mi ĝis nun ne sukcesis enrigardi).

Deligny mortis en 1950. Ni estas informitaj pri lia Esperanta vivo per lia aŭtobiografio kaj tiel scias ke li, foje kun sia fratino, partoprenis preskaŭ ĉiujn UKojn kaj kutime antaŭ- kaj postkongresis. Pri lia persona vivo, origino, postlasaĵoj ... preskaŭ nenio estas konata.

De tempo al tempo tiu Esperanta kolekto estas menciita en la Esperanta gazetaro, sen precizaj informoj. Dum la pasintaj jaroj mi du- aŭ trifoje skribis al la nuna estro de la biblioteko kaj ricevis respondon ke la kolekto ne estas alirebla kaj ke ne estas tujaj planoj por okupiĝi pri ĝi. Antaŭ nelonge mi eksciis ke francino (familiano



Esperanto-Fondaĵo Cesar Vanbiervliet en Kortrijk



Esperanto-kolekto en Saint-Omer (historia foto)

de mortinta esperantisto) ankaŭ korespondis kun la biblioteko. Kunigante la ricevitaĵojn, eblas konkludi ke komence de la dua mondmilito la kolekto estis enpakita en kestoj kaj transportita al iu loko en centra Francio. Post la milito la kestoj revenis al Saint-Omer, sed neniam estis elpakitaj. Nun ili estas ie en Parizo por elpakado kaj purigo. Ni do ankoraŭ havu iom da pacienco kaj esperu ke la jubilea UK estos instigo por igi tiun kolekton alirebla.

Gray (Francio)

En franca urbeto Gray troviĝas la *Nacia Esperanto-Muzeo*. Ĝi estis fondita en 1977 de Georges Junier kaj oficiale inaŭgurita en 1987. La muzeo ampleksas unu etaĝon de renovigita ekslernejo, transformita en kulturalan domon. Al leteroj miaj de la pasintaj jaroj ne venis reago. Aliflanke, ekzistas, krom retpaĝaro, ankaŭ sufiĉe nova vikipedia-paĝo pri ĝi.

Danlando

El Danlando ĵus venis la novaĵo ke la restanta librokolekto

de Gustav kaj Bodil Bühlmann, konataj danaj geesperantistoj (mortintaj en resp. 1999 kaj 2012) iris al la *Universitato de Roskilde*. Alia parto jam iris al la dana *Reĝa Biblioteko*.

La postlasaĵo de alia fama dano, Paul Neergaard, ŝajne ankoraŭ troviĝas en kestoj ie en la *Reĝa Biblioteko*, nealirebla.

Elstaraj kolektoj

Nia ĉefa biblioteko, profesie prizorgata, estas la *Kolekto por Planlingvoj* kaj *Esperanto-muzeo* en Vieno. Krom tiu, estas aliaj kiuj dum la pasintaj jaroj elstare funkciis. Mi mencias kelkajn.

Biblioteko Juan Régulo Perez (Madrid, Hispanio)

Tiun bibliotekon mi nur antaŭ du jaroj malkovris. Ĝi havas profesinivelan katalogon kun multaj bitigitaj eroj (Bitoteko). Estas, laŭ mia scio, la nura Esperanto-biblioteko kiu sukcesas aperigi sian kolekton en la kupola retejo de *Europeana*.



Nacia Esperanto-Muzeo en Gray

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI, La Chaux-de-Fonds, Svislando)

CDELI originas el iniciato de Claude Gacond el 1956. Dum la jardekoj ĝi evoluis ĝis la nuna granda kolekto, kun ampleksa retpaĝaro.

www.gutenberg.org

Gutenberg estas biblioteko tute virtuala kaj la tutunua projekto kiu bitigis librojn. Inter ĝiaj 42.000 libroj estas ankaŭ kvindeko da Esperantaj. En ĝi troviĝas eldonaĵoj liberaj de kopirajto, en tekstoforno (kaj ne kiel komputilaj dosieroj en traserĉebla pdf-formo, nuntempe la kutima metodo por bitigi librojn).

Katalogado

Jam delonge ekzistanta ideo ne realiĝas ...

Jam de pluraj jaroj cirkulas la ideo por krei unu tutmondan katalogon de ĉiuj Esperantaj eldonaĵoj. Tiel nun funkcias plejparto de la publikaj bibliotekoj: estas centra katalogo je landa aŭ regiona nivelo, al kiu aliĝas la lokaj bibliotekoj. Multas la avantaĝoj: sufiĉas unu biblioteka programo, sufiĉas unufoja registrado de libro, facilas trovi iun libron en alia loko, ktp. Bedaŭrinde, ĝis nun en Esperantujo ne estas trovata persono aŭ instanco kiu pretas kaj kapablas okupiĝi pri tiel komplika projekto. Plej urĝa bezono nun estas ellaboro de proceduro por eviti ke la samaj libroj aŭ revuoj estas bitigitaj plurfoje (jam okazis !)

Ĉu eblas per Library Thing ?

Antaŭ unu jaro mi ekkonis la retpaĝon www.librarything.com. Per ĝi eblas katalogi kaj enretigi

sian personan librokolekton. La paĝaro estas parte tradukita al Esperanto kaj mi taksas ke inter 50 kaj 100 esperantistoj jam aperigis sian librokatalogon tie, i.a. AEA, la Aŭstralia Esperanto-Asocio. Ankaŭ mi faris kaj mi nun estas registranta virtualan katalogon de belga esperantisto A.J. Witteryck (1965-1934).

Library Thing certe havas mankojn, sed ĝis nun mi ne trovis pli bonan katalogon sistemon por private uzo. Mi demandas min ĉu ĝi povus taŭgi kiel tutmonda Esperanta katalogo? Tekniko verŝajne jes, sed ni bezonus spertan uzanton por esplori tion. Ne bone funkcias la

komunikado inter la aliĝintoj.

Provprojekto povus esti la registrado de "Bibliografio de Internacia Lingvo" de P. E. Stojan, fidinda superrigardo de la Esperanto-eldonado ĝis la 1920-aj jaroj.

Pli da senpaga retspaco

Se retpaĝo estas prizorgita de profesiulo, oni pagas la fakturon de la retrovizanto kaj tiu ĉion enordigas. Esperanto-bibliotekoj kutime estas prizorgataj de volontuloj kaj apenaŭ havas financajn rimedojn. Per *Google* aŭ *Weebly* eblas senkoste kaj relative

facile krei retpaĝaron kaj aperigi bazan katalogon. Nun ankaŭ eblas senpage kaj preskaŭ senlime enretigi bitigitajn dokumentojn kaj fotojn. *Google Drive* ofertas 15 gigabajtojn kaj *Flickr* eĉ metas je dispono terabajton por aperigi bildojn.

* * *

Informoj pri la grandaj Esperanto-bibliotekoj troviĝas en la UEA-jarlibro 2013 sur paĝoj 80-84. Pri plejparto de la menciitaj nomoj estas pli detalaj informoj en la Esperanta vikipedio, <http://eo.wikipedia.org>.

ESPERANTO-MUZEO EN SVITAVY FESTIS SIAN KVINJARIĜON

La lastan semajnfino de septembro 2013 okazis en la ĉeĥa urbo *Svitavy* Jubilea Solenaĵo omaĝe al la 5-a naskiĝtago de *Esperanto-Muzeo* kaj 80-jariĝo de la loka *Esperanto-klubo*.

La muzeo estis solene inaŭgurita la 20-an de septembro 2008 en la teretaĝo de la romantisma *Domo de Ottendorfer*, situanta rando de la ĉefplaco, kaj ĝian ekeston grave finance subtenis *Muzeo pri kulturo de Ĉeĥa respubliko*, la urbo *Svitavy* kaj la usona fondaĵo *Esperantic Studies Foundation*. La domo estas posedaĵo de la urbo, prizorgata de la Urba muzeo kaj galerio kaj *Esperanto-muzeo* estas tie en senpaga luo. La tuta interna ekipaĵo estas posedaĵo de *Ĉeĥa Esperanto-Asocio*. La ĉefaj celoj kaj aktivecoj de la muzeo estas multflanke kaj multmedie informi ĉeĥan kaj eksterlandan publikon pri Esperanto, pri ĝia historio kaj bezonateco kaj utiligeblecoj en la nuna mondo, okazigi portempajn

Pavla Dvořáková
nome de la *Muzea Grupo de ĈEA*

temajn ekspoziciojn kaj kulturajn kaj klerigajn aranĝojn (ankaŭ por neesperantista publiko - ekz. manlaborajn atelierojn por infanoj kaj regulajn vojaĝprelegojn), prilabori kaj alirebligi Esperanto-bibliotekon kaj arkivon kaj vendi Esperanto-librojn.

La muzea biblioteko nun havas pli ol 13 mil katalogitajn bibliotekajn unuojn, plejparte librojn kaj gazetkolektojn (inter ili estas ankaŭ "Zagreba Esperantisto", donacita ĉi-jare de DEC). La libroj prunteblas surloke kaj parto de ili laŭ interkonsento ankaŭ hejmen.

Ekster la domo la muzeo disponas ankaŭ pri aparta deponejo por arkivo kaj multoblaĵoj. La muzeo



Monda pupekspozicio en Higashikagawa

Etsuo Miyoshi

“Ĉi tiu Pupekspozicio estas okazo por lerni pri aliaj kulturoj kaj kreskigi la popolan interkompreniĝon”, emfazis la Ambasadoro de Pollando en Japanio, s-ro **Cyryl Kozaczewski**, dum la malferma ceremonio de la 3-a Monda Pupekspozicio, ĉi-jare dediĉita al Pollando. La malfermon ĉeestis la guberniestro de Kagawa, s-ro **Keizō Hamada**, la urbestro de Higashikagawa, s-ro **Hideki Fujii** kaj aliaj aŭtoritatuloj pri kulturo kaj turismo de la regiono. Pupambasadorino veninta el Pollando, S-ino **Agnieszka Mozer**, varme invitis la publikon viziti la ekspozicion, kiu daŭris ĝis la 6-a de oktobro.

La kolekto, farita danke al la helpo de esperantistoj tra la mondo, konsistas el pli ol 800 pupoj portantaj tradiciajn kostumojn el 44 landoj.

La Pupekspozicio estas evento ĉiujare organizata de la Nova Turisma Asocio en la urbo



La plej multnombraj estas pupoj el Albnio

Higashikagawa (Kagawa, Japanio) <http://www.hnt.or.jp> kaj okazanta en ĝia sidejo en Hiketa (Izutsu Yashiki, 769-2901 Higashikagawa, Hiketa 2163, Japanio; Tel. +81 879-238557). Ĉi-jare ĝi havis la aŭspicion de la Ministerio pri Kulturo kaj Nacia Heredaĵo de la Pola Respubliko, la Ambasadoro de Pollando en Japanio kaj la pola provinco Lubuŝo.

jam efektivigis plurajn interŝanĝojn, ekz. kun **IKC Herzberg, Germana Esperanto-Biblioteko** en Aalen kaj **Nacia Esperanto-Muzeo** en Gray (Francio).

En la muzea ejo unu duono servas por daŭra ĝenerala informekspozicio pri Esperanto. Krome ĉiujare estas preparata nova tema ekspozicio - ekde junio 2013 eblas viziti tie ekspozicion “**Esperanto kaj muzoj**”, kiu prezentas artan kreemon de esperantistoj kaj prezentas ankaŭ unikan informkolekton pri profesiaj artistoj, kiuj parolis Esperanton - ne nur pri vidartistoj, sed ankaŭ pri muzikkomponistoj, aktoroj k.t.p. Inter tiuj ne mankas ankaŭ fama kroata aktorino **Vida Jerman**.

Krom informpaneloj kaj librovitriroj por vizitantoj disponeblas ankaŭ multmediaj dokumentoj (elektronikaj libroj, filmoj, muzikaj dosieroj, kolektaĵoj k.t.p.) en la muzea komputilo (forportebaj sur la poŝmemorilo) kaj sur la interaga tuŝkrano. Ekde oktobro 2011 la muzeo estas ankaŭ oficiala sidejo de **Ĉeĥa Esperanto-**

Asocio. Tamen en la ejo troviĝas neniu ĈEA-oficejo. La funkciadon volontule prizorgas **Muzea Grupo de ĈEA** kunlabore kun membroj de la loka klubo. La iniciatinto de la ideo kaj la prezidantino de ambaŭ estas **Libuše Dvořáková** el Svitavy. Menciindas ankaŭ, ke Svitavy kaj la muzeo jam gastigis plurajn internaciajn Esperanto-aranĝojn (EKOTUR 2009, Vikimano 2011, OSIEK-Konferenco 2012, KELI-Kongreso 2013)

La urbo **Svitavy** situas fakte en centro de Ĉeĥio, en milda kaj turisme alloga regiono de Bohemia-moravia limregiono, kiu estas de ĉiuj direktoj facile trafike atingebla. Ĝi estas i.a. naskiĝloko de **Oskar Schindler**, fama savinto de judoj dum la dua mondmilito, kun kies vivo vi povas konatiĝi en la urba muzeo. La urbo havas sendube multon interesan por proponi dum via restado. Vizitindas nepre ankaŭ pitoreska renesanca urbo **Litomyšl** troviĝanta sur la UNESKO-listo, kaj aliaj vidindaĵoj. Pri memorindaĵoj de la urbo eblas informiĝi en la urba retejo www.svitavy.cz, funkcia

ankaŭ Esperantlingve.

La muzeo havas sian propran paĝaron www.muzeum.esperanto.cz kaj ekde januaro 2011 ankaŭ sian iperitnian paĝon (<http://www.ipernity.com/home/181031>), kie ĝi senpage diskonigas diversajn multmediajn dokumentojn (pli ol unu milon en 38 albumoj).

Ni elkore invitas vin veni por konvinkiĝi kaj malkovri ne nur la muzeon mem, sed ankaŭ la urbon kaj ĝian ĉarman ĉirkaŭaĵon kaj amikiĝi kun la lokaj esperantistoj! Kontaktdreso al la muzeo estas muzeagrup@esperanto.cz, kaj kontakto al la loka klubo estas svitavy@esperanto.cz.

Por la lasta semajnfino de septembro 2014 estas planata inaŭguro de la nova tema ekspozicio “**Esperanto kaj kolektado**”, samtempe kun la tutŝtata filatela konkursa ekspozicio okazanta en la Urba muzeo kaj galerio. Por la semajnfino estos planata ankaŭ akompana kultura kaj turisma programo, tial ankaŭ eksterlandaj gastoj estas sincere bonvenaj!

“PADMA” ELDONIĜIS EN ESPERANTO

*Por la 25-a jariĝo
de la forpaso
de Tibor Sekelj*

✍ YU Jianchao

Nove eldoniĝis Esperanta libro *"Padma, la eta dancistino"* de Tibor Sekelj. La libro estas verkita originale en Esperanto, kvankam unue ĝi aperis en la (serbo)kroata lingvo en 1977.

Tiu informo estas ĝojiga novaĵo. Mi legis la anoncon en *"Eŭropa Bulteno"* n-ro 128 (junio 2013). Ĝis tiam mi jam kelkfoje legis kaj tradukis ĝin en la ĉinan lingvon. Mi ĉinigiĝis ĝin el la Esperanta elektronika versio, senditan en marto samjare de Erzsébet Székely, la vidvino de Tibor.

Kiel diras la anonco en *"Eŭropa Bulteno"*, "temas pri porinfana libro, kies scenejo estas la hinda vilaĝo Kondapuro". La romano per 10 ĉapitroj rakontas historietojn kvazaŭ perlojn traligitajn de la aŭtoro, kiu estas la ŝlosila figuro, en la romano nomiĝanta onklo Bend. Dum sia loĝado en la vilaĝo Kondapuro, li helpis al knabino Padma elfosi sian latentan talenton en dancado kaj realigi la revon – fariĝi dancistino.

"Mi komencas en la komenco". Pardonu, ke mi prunteprenas la frazon de Tibor uzitan en kelkaj liaj verkoj, por resume rakonti la romanon.

Bend estas vojaĝanto el Eŭropo. Li hazarde haltis, dum sia vojaĝo, en la vilaĝo Kandapuro de Hindio, kaj decidis resti tie por certa tempo. Li loĝas en la domo de vilaĝano Kumar, kiu havas filinon nomatan Padma. Jam en la unua ĉapitro titolita *"Renkonto kun spirito"*, la aŭtoro post

kelkaj paĝoj ekprenzas belan renkontiĝon de la du gravaj figuroj: onklo Bend kaj knabino Padma, kaj detale priskribas ŝian aspekton *"La knabino estis por siaj naŭ jaroj sufiĉe altstatura kaj svelta. Ŝiaj nigraj okuloj meze de la bruna vizaĝo, brilis per aparta brilo, kvazaŭ du nigraj fajreroj. Ĉio ĉi estis enkadrigita en ondumantan nigran hararon, kiu ekde la divido en la mezo de la kapo faladis dekstren kaj maldekstren sur la ŝultrojn kaj la dorson, kvazaŭ iu nigra akvofalo."* (paĝo 7).

La libro havas 10 ĉapitrojn, ilustritajn per po unu desegnaĵo, respugulantaj la pitoreskajn scenojn de la vilaĝo kaj la amikeco inter la onklo kaj la knabino, kiu maturiĝas sekvante seriojn okazaĵojn. Oni unuspire ellegas kiel ili kune kun la tuta vilaĝo spektis la jongladon de *dresisto de serpento*, (dua ĉapitro), spertis la *buntan printempon* (tria ĉapitro) dum kiu koviĝis la revo de Padma esti dancistino, aŭdis pri la *Saduo kaj liaj rakontoj* (kvara ĉapitro), kiu prezentas belajn legendojn pri Ŝivao, la dancdio kaj celas la sanktan riveron Gango. Mi citu: *"... la saduo diris al onklo Bend ke nun li iras rekte al Benareso, urbo, kiu troviĝas sur la sankta rivero Gango. – Tie mi deziras submetiĝi al kompleta purigado de ĉiuj pekoj, ĉar tion povas fari nur la akvoj de tiu sankta rivero."* (paĝo 38).

Ili celebris la *geedziĝ-feston* (kvina ĉapitro), la tradician nuptan moron laŭ hinduoj, kaj dume Padma unufoje prezentis sian dancadon, havis malkovron de *nova fantomo* sur nokta vojo (sesa

ĉapitro); kaptis kaŝitajn ŝtelistojn laŭ iliaj voĉoj en la kaverno (oka ĉapitro); pacigis la *panikon en la vilaĝo*, trafis kvazaŭ scenejon, ke la *"rakontoj ekvivas"* (naŭa ĉapitro) pro la eltrovo de Padma, kaj alvokis la sciencistojn je ilia vizito el la urbo (deka ĉapitro)... Finfine onklo Bend enkondukis Padman al vojo fariĝi vera dancistino...

Dum legado oni ekkonas hindajn manĝaĵojn kaj manĝmanierojn, domajn ornamaĵojn de belaj dezajnoj, naciajn dancaĵojn, vivkutimojn, vestaĵojn, ktp. *"... onklo Bend rimarkis, ke ili estas vestitaj tre diversmaniere. Iuj vestis kutiman blankan ĉemizon kaj streĉan pantalonon, dum aliaj havis volvitajn ĉirkaŭ la talio dotion*." Tio estas tre simpla vesto, kiun oni tute ne bezonas kudri.*" (paĝo 5). Li priskribis la nupton de hinda vilaĝo, prezentis la legendajn diojn kiaj Ŝivao, la danca dio, kaj samtempe faris sciencan popularigon, por ke la analfabetaj vilaĝaj infanoj kun rondigitaj okuloj rigardu al la ekstera mondo: *"Ankaŭ onklo Bend ne ekdormis longe. Li pensadis pri knaboj kaj knabinoj en lia hejmlando kaj pri iliaj deziroj. Li fine ekdormis kontenta pro la fakto ke li povis kontribui ke almenaŭ parte realiĝu la revo de knabino en tiu ĉi fora lando, Hindio"*... (paĝo 45)

Kontraste kun aliaj verkoj de la aŭtoro, maloftas en la romano la neologismoj, por kiuj pledis Tibor Sekelj tiel, kiel montras iama debato inter ĉina veterano Laŭlum kaj Tibor Sekelj. Laŭlum laŭdis, ke en sia poemaro *"Elpafu la sagon"* Tibor Sekelj *"enkondukis preskaŭ 50 neologismojn el la afrikaj, aziaj*

sudamerikaj kaj oceaniaj lingvoj por celi la veran internaciecon de la lingvo." (Laŭlum: *Du Bukedoj el la Manoj de Tibor Sekelj*; "El Popola Ĉinio", 1985/01 paĝo 30), sed samtempe atentigis pri kelkaj ĉindevenaj vortoj kritikante, ke li sen vera bezono uzis neologismojn. Responde al la kritiko, en sia artikolo Tibor Sekelj klarigis: "*Nia celo devas esti enkonduki tiajn vortojn kiujn la plivastigo de la Esperanta kulturo, kaj de niaj horizontoj ĝenerale, postulas.*" (Tibor Sekelj: *La Naskiĝo de Neologismoj*; "El Popola Ĉinio" 1985/09 paĝo 22). Fakte, en la rakontado pri Padma, li uzis nur kelkajn vortojn hindajn, sedube nedebatindajn, laŭ mi. Ekzemple, pri "dotio", kiu estas la tipa hinda vestaĵo, li donis klarigon tuj post la apero de la vorto: "*La longan blankan tolajon oni volvas ĉirkaŭ la talio, la antaŭan parton oni kunigas kaj inter la kruroj metas malantatien, por enigi ĝin sur la dorso en la talian parton. La plejmulto de la pli aĝaj viroj portis longan strion de tolo ĉirkaŭ la kapo, formante el ĝi turbanon.*" (paĝo 7), kaj la aliajn, ekzemple "bindio" (bonaŭgura signo el ruĝa farbo por ornamo la frunton de virinoj), "holio" (printempa festo), "ĉapatio" kaj "gio" (mangajaĵoj), li klarigas per piednotoj. Oni eĉ ellernas el la romano kiel saluti en la hinda: *Namaste!*

"*Padma, la eta dancistino*" estas la libro finlegebla per unu spiro. La aŭtoro, skribante pri folklorajaĵoj de hinda vilaĝo, siluetas la hindan kulturon fonte de Gango, patrina rivero, kiu nutras unu el la antikvaj civilizoj en la Oriento, karakterizatan per miksaĵo de hinduoj kaj bramanoj. "*Tie ĉi Viŝnuo kaj Bramo disputas. Kaj jen malantaŭ la kolono venas Ŝivao por diri al ili la veron.*" (paĝo 72). Oni ravite eniras la kulturen trezorejon, kiel atestas la jena citaĵo: "*Tio ĉi estas vere grandioza! La homoj kiuj ĉi tie vivis antaŭ kelkaj*

jarcentoj estis grandaj artistoj." (paĝo 72). Ĉu el tiaj priskriboj ni ne enspiras nuancojn de Hindio el la fora kaj pompa antikveco?

Mi vizitis Hindion en 2008, kaj dum nia solena Azia Kongreso de Esperanto mi ja ĝuis la elegantan dancadon baratan, vidis surstrate la psilan ĵongladon, miris pri la ornamaĵoj ĉe la pordo de ĉiu domo, kaj des pli trafis spektaklan nupton ... Mirante mi eltrovis, ke ĉio ĉi reaperas dum mia legado de la romano.

Fakte, en la 50-aj jaroj de la pasinta jarcento, Tibor Sekelj kelkfoje vizitis Hindion kaj foje estis komisiita instrui Esperanton al hinda sanktulo Vinoba Bhave. Dum unu monato, li "*sukcesis donaci unu lingvon*" al la sanktulo, tamen li mem konsideris ĝin "*tiel etan, sensignifan donacon compare kun la tuta filozofio, kiun mi kompanse ricevis.*" (Tibor Sekelj: "Mondo de travivaĵoj", paĝo 124). Mi tute konsentas kun li je la konkludo. Lian humanisman animecon atestas la pitoreska priskribado en ĉiuj liaj verkoj, ankaŭ en tiuj pri vojaĝoj en Hindio, kion kompreneble elspiras la romano. Precipe impresiva estas la priskribo pri la prezentado de dancistino: "*Ŝi dancis per ĉiu parteto de sia korpo. Ŝiaj okuloj dancadis por si mem, kaj aparte la*

manoj, la ŝultroj, la brovoj, lipoj, kaj ĉio sur ŝi estis samtempe en intensa movo. La plej bela el ĉio estis la movo de ŝiaj manoj. En iu momento ili aspektis kiel birdoj kiuj volas ekflugi..." Tio reportas min al la spektakloj de la kongresaj tagoj:

Mi tre dezirus paraleligi la romanon al la aliaj du libroj de Tibor Sekelj: "*Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo*" kaj "*Temuĝino, la filo de la stepo*". La unua priskribas dekdu-jaran knabon Kumeŭaŭa, kiu savis la pasaĝerojn vojaĝantajn tra la amazona praarbaro plena de diversaj danĝeroj, kaj la alia prezentas la surstepan knabon Temuĝino, kiu elkreskis kiel imperiestro de Mongolio, suferinte monton da mizeroj. Ambaŭ estas virece kuraĝigaj, kaj nia Padma, montras la konsciiĝemon de dancema vilaĝa knabino, kies subtileco agrable respondas al la knaba kuraĝo. Mi aŭdace proponus alian titolon al la libro: "*Padma, la filino de la dancdio*" (aŭ *Ŝivao*). Ili triope konsistigus kompleton da porinfanaj libroj, kaj almenaŭ ŝajne, pli-malpli konsolus nian karmemoran Tibor Sekelj je lia bedaŭro, ke li ne povis daŭrigi la rakontadon pri Kumeŭaŭa kiel trilogion, laŭ la propono de la eldonisto tiam, kiam li jam serioze suferis de malsano ...



Yu Jianchao naskiĝis en 1956, studis en fakultato pri la angla lingvo kaj literaturo en Qingdao - Normala Kolegio dum la jaroj 1979-1981, pri la ĉina literaturo en Shangdong - Normala Universitato dum la jaroj 1987-1989, pri la internacia ĵurnalismo (Esperante) en Pekina Brodkasta Instituto dum la jaroj 1989-1991. Ŝi instruis la anglan lingvon en Qingdao-a TV-universitato dum la jaroj 1981-1989. Eklaboris en Ĉina Radio Internacia en 1992, kaj estris ĝian Esperanto-Redakcion dum la jaroj 1995-2006. Nun ŝi estas ĉefraportisto kaj redaktoro de la trimonata revuo "Panorame".

LA BELECO TROVIĜAS EN SIMPLECO

Zlatoje Martinov

Tibor Sekelj:
PADMA, LA ETA DANCISTINO
Grafokom, Ďurĉevac, 2013



En dek mallongaj ĉapitroj, per klara, flua lingvo kaj perfekta stilo **Tibor Sekelj** donacis al la legantoj de la internacia lingvo brilan historion pri la malriĉa hinda knabino **Padma** kies infanaj revoj estas iĝi dancistino. Helpas ŝin per konsiloj, morala subteno kaj per vastigo de ŝiaj intelektaj horizontoj, iu mezaĝa vojaĝanto traveturinta milojn da kilometroj kiu iun tagon venis al la malriĉa kaj simpla hinda vilaĝo **Kondapur**.

Onklo Bend kiel nomis lin Padma, komence rigardita suspekteme kaj poste iĝinta ŝatata far ĉiuj vilaĝanoj, vivis kaj kondukis kiel ili kaj fine atingis ilian konfidon. Aparte al li konfidis la knabineto Padma kiun onklo Bend preskaŭ patre ŝatis kaj zorgis pri ŝi. Ili du faris longajn promenojn tra la ĉirkaŭaĵo, diskutante pri diversaj temoj. Li rakontis al la junulineto interesajn pri la vivo de aliaj popoloj en la mondo, pri

iliaj kutimoj, moroj... Li definitive komprenis ke Padma estas tre saĝa infano kiu meritas pluan edukadon. Per sia aŭtoritato ĉe la gepatroj de Padma, li sukcese konvinkis ilin, malĝaŭ la konservativa reago de aliaj vilaĝanoj, ke Padma devas viziti lernejon por esti edukita kaj memkonscia persono. Tio estas la tuta historio de la romano kiu finiĝas per foriro de la knabineto al granda urbo kaj per ŝia enskribiĝo je muzika lernejo por plulerni la muzikon kaj la dancadon.

Sed se la romanhistorio estas simpla, la maniero per kiu **Sekelj** konatigas la leganton kun Hindio, estas impresvoka. Je la fono de la ĉefa romanhistorio, oni povas multe ellerni pri la hinda mitologio, historio, kulturo, sed ankaŭ pri la hinda vivmaniero, nutrado, kutimoj ĝenerale. Tra la rakontado de saduo – la hinda religiulo, fakte maljuna kaj vaganta saĝulo – la leganto ekscias tre interesajn detalojn pri la

hinda panteono (**Viŝnuo, Ŝivao**) kaj same pri la mirakloplena potenco de la sankta rivero **Gango**. El la ĉapitro titolita "Geedziĝfestoj", Sekelj malaltrude klarigas al ni la morojn de la rura Hindio, el la alia ĉapitro titolita "Dresisto de serpentoj" oni povas kompreni kiel forta estas la hinda kredo je magia potenco de la serpento, kiun oni perceptas hipostazo de la dioj. Sekelj ne estas Tibor Sekelj se en la tutan romanhistorion li ne enmetus la dinamikan elementon kun dramatika kaj krimea impliko: nome, iu krimgrupo kiu ŝtelas diversajn aĵojn de la vilaĝanoj, inkluzive la brutaron, la ŝtelaĵojn kaŝas en kaverno ĝis tiam nekonata kaj nemalkovrita far vilaĝanoj. En la kaverno troviĝas skulptaĵoj de la hindaj dioj faritaj antaŭ miloj da jaroj, tute konservitaj, sed al la publiko nekonataj. Hazarde, dum la ludado kun geknaboj Padma enfalis en la kaverton kaj tie ŝi vidis strangajn figurojn, sed ankaŭ la ŝtelistojn, kverelantajn pri la rabaĵoj. Timigita, la junulino tuj informas la onklon Bend pri la rabistoj kaj pri la ĵus malkovrita kaverno, kaj Bend la vilaĝanojn. Per komunaj fortoj ili kaptis la ŝtelistojn kaj alarmis la policon kiu arestis la tutan krimgrupon. Tute hazarde, do, oni malkovris unu el la plej brilaj monumentoj de la hinda historio kaj kulturo. La plej grandajn meritojn havis, kompreneble, la knabineto, kiun la loka aŭtoritato monpremiis kaj la premio ebligis al ŝi enskribiĝi en la tiom dezirata muzik-dancan lernejon.

Al la atentema leganto antaŭ la okuloj ŝvebas la bildo pri la bonkoro de la mondvojaĝanto kiu helapis al Padma, kiu ĉiuvespere antaŭ la enlitiĝo notis la dumtagajn impresojn, kaj same la demando: kiu povas esti tiu homo? Kaj, kompreneble, li tuj povas respondi: la aŭtoro mem.

Ankoraŭfoje mi volas substreki la simplan sed impresvokan lingvo-stilon de Tibor Sekelj. Tio ĉi sendube estas la ĉefa trajto de lia tuta literatura verkado. Oni ne diras vane: la beleco estas en simpleco.

TRIURBA TORENTO NASKIĜAS

 *Kerstin Rohdin*

Inter la 12-a kaj 14-a de septembro okazis la naskiĝfesto de TORENTO-KLUBO en la triurba regiono ĉe la Balta Maro en Pollando "Gdynia-Sopot-Gdansk". La evento okazis en *Sopot*, la ĉarma someruma urbo en la tagoj, kiam somero turniĝis al aŭtuno. Tamen, nek aŭtuna pluvo, nek aŭtuna ventego atingis nin. La anstataŭanto de la urbestro solene salutis la klubanojn kaj la gastojn el kvar landoj. Sur la deklivo sur kiu ni staris, kreskis belega, granda fago. Mi tion trege ĝuis, ĉar tio memorigis min pri mia hejma regiono.

La nova klubo, plena de entuziasmo, baptiĝis apud la 54-jara Esperanta kverko, plantita dum la TEJO-kongreso en 1959. La unua kverko estis plantita en 1927, sed ĝi fariĝis detruita dum la milito. La gardanto de la kverko, s-ro *Harry Spirowski*, feste baptis la klubon per verŝo de ĉampano en apudan torenton. La nomo de la urbo Sopot signifas "torento". La patro de s-ro *Harry Spirowski* dum multaj jaroj zorgis pri la kverko. Li ankaŭ drenis marĉan terenon kaj kreis grandan ĝardenon proksime. En ĝi li kolektis multajn arbojn kaj plantojn el diversaj landoj. En tiu ĝardeno, nun iom fabela, sovaĝa, mistika, kreskis multspecaj fruktoarboj, ĉerizoj, prunoj, piroj, eĉ kreskis vinberoj, kiuj gustis tute dolĉe. En tiu maĵnova, fabela ĝardeno, subite aperis bongusta pikniko. Ĉio estis fabela, sorĉa kaj absolute ne ĉiutaga.

Posttagmeze okazis ekspozicia malfermo pri fama pola poeto *Julian Tuwim*, kiu ankaŭ estis esperantisto. Krom ke li verkis kelkajn poemojn en Esperanto, li ankaŭ tradukis poemojn de aliaj poetoj. *Elwira Twardowska* lerte prezentis *Julian Tuwim* en agrabla plektaĵo inter Esperanta kaj pola lingvoj. Knabeto el Kaliningrad deklamis poemon de *Julian*

Tuwim en la pola lingvo. Multaj el liaj poemoj ankaŭ estas tradukitaj en fremdajn lingvojn. Fama, juna operkantistino prezentis kanzonojn de *Julian Tuwim* en la pola lingvo kaj en traduko Esperanten de *Andreo Bach*, la prezidanto de la nova klubo. Mi vere sentis min levita al pli altaj niveloj de la vivo. Estis bonega kunlaboro inter Esperanta klubo kaj la urba biblioteko, vere modela kunlaboro kun "la socio". La publiko nombris 50-60 personojn.

Tiuj, kiuj ankoraŭ havis fortojn, vespere diskutis pri la temo "La plej taŭga modelo de la Esperanto-movado". La eternaj demandoj kun iom novaj respondoj.

La posta tago komenciĝis kun griza ĉielo. Tamen granda grupo partoprenis en "Urba Ludo". Promenante tra la urbo en etaj grupoj, ni devis trovi diversajn famajn lokojn, kaj respondi je diversaj demandoj pri la urbo. Ni multon lernis pri la historio kaj pri diversaj famajoj de la urbo Sopot. Post longa promenado tra La Suda Parkarbaro, apud la maro ni denove trovis bongustan piknikon. Tie la estraro de la klubo preparis "leteron" en kaj pri Esperanto, metis ĝin en botelon, kiun ili fermis per lako. Poste ili solene ĝin portis al la longa, fama moleo, de kie la prezidanto ĝin jetis maren. Nun ĝi naĝas kun Neptuno al iu strando de la Balta Maro.

Por la fina manĝo vespere oni instruis kiel bonmodele tosti al la novnaskito. En la "kongresinformoj" ni estis instruitaj kiel oni preparu bonajn tostojn. La renkontiĝo estis plena da ludo de novnaskita infano. Mi renkontis plurajn geamikojn kaj ankaŭ plurajn novajn gekonatojn.

Bonan sukceson al la nova klubo Torento! Daŭrigu vian gajan entuziasman, ludan laboron!!!!

LA AMBASADORO SORENSEN KAJ ESPERANTISTOJ

 *Miĉo Vrhovac*



La 12-an de septembro, la ambasadoro de Eŭropa Unio en Bosnio kaj Hercegovino *Peter Sorensen*, organizis en Banja Luka akcepton por reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj. Je la nomo de Esperanto-societo "La mondo" el Banja Luka kun la ambasadoro tagmanĝis kaj interparolis *Miĉo Vrhovac* kaj *Nada Dimkov*. Ili interparolis pri la plej gravaj projektoj en la pasinteco kaj estonteco. Ili aparte elstarigis la bonan kunlaboron kun esperantistoj el Serbio kaj Kroatio. La ambasadoro deziris sukceson en la laboro kaj akcentis ke esperantista asocio estas grava por Bosnio kaj Hercegovino.

LA 11-a VERKISTA RENKONTIĜO



✍ Júlia Sigmund

🌐 www.esperanto.hr

Miaj plej malnovaj esperantistaj geamikoj estas de eks-Jugoslavio. Mi konatiĝis kaj interamikiĝis kun ili en 1968, dum la Unua PIF (Pupteatra Internacia Festivalo) en Zagrebo.

Mi neniam sciis, kiuj el ili estas kroatoj aŭ serboj, slovenoj aŭ alinacianoj. Ili ĉiuj estis miaj tre karaj esperantistaj geamikoj. Intertempe pasis 35 jaroj, sed nia amikeco ne ŝanĝiĝis, ja la sincera amika amo estas senmorta! Unu el ĉi tiuj plej malnovaj Esperanto-amikoj estas *Spomenka Ŝtimec*. Ŝi povus esti mia filino, ja ŝi estas ĝuste 20 jarojn pli juna ol mi. Tamen, mi ne nur amas, sed ankaŭ profunde estimas ŝin, kvazaŭ ŝi estus pli olda, estiminda kaj imitinda esperantisto. Krom ŝi mi konas neniun alian personon, kiu organizas sur sia propra bieno internacian Esperanto-renkontiĝon. Se ŝi estus milionulo kaj la lingvo Esperanto kaj la literaturo estus ŝiaj hobiaj, eĉ tiam nur gratulojn ŝi meritus. Sed tiel, kiel ŝi sukcesas organizi ĉi tiujn renkontiĝojn, simple oni devas admiri ŝin.

La 14-an de septembro 2013, okazis la 11-a Renkontiĝo

de Esperantlingvaj verkistoj. Kiel ĉiam, ankaŭ nun, partoprenis diversnacaj literaturistoj.

Jen, la invititaj gastoj:

Achtar Etemadi, irana ĵurnalistino-tradukistino. Ŝi tradukis el Esperanto al persa lingvo la mondfaman infanlibron "Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić" de Ivana Brlić-Mažuranić, antaŭ 100 jaroj verkitan. Jubilea libro! Ŝin intervjuis *Spomenka Ŝtimec*.

Tihomir Engler, prezentis la kroatan revuon "Libri et liberi".

Zdravko Seleš sekvis kun la prezentado kaj analizo de poemaro "Cigna kanto" de *Josip Pleadin*. Legis tri poemojn *Đivo Pulitika*. Ĉiuj bedaŭris, ke la aŭtoro ne povis alveni.

Same ni bedaŭris la mankon de *Kaja Farszky*, tamen anstataŭ ŝia muziko, saksofonludis por ni *Denis Tišljar*, 12 jara denaska esperantisto.

Zlatoje Martinov el Serbio, prezentis la geedzojn-verkistojn *Júlia Sigmund* (Rumanio/Italio) kaj *Sen Rodin* (Italio), komunaj aŭtoroj de "Libazar" kaj tero", kaj komentis ankaŭ iliajn antaŭajn verkojn.

Poste ankaŭ *Spomenka Ŝtimec* parolis pri la du aĝaj aŭtoroj. Laŭ ŝia peto, *Sen Rodin* rakontis, kiel li lernis Esperanton de la onklo *Mirza Marchesi*, kiu Esperantigis la fabellibron pri Pinokjo, kaj *Júlia Sigmund* laŭtlegis sian poemon "Dialogo", tradukitan en 52 lingvojn. Inter la ĉeestantoj troviĝis kvar el la tradukintoj! (persa: *Achtar Etemadi*, kroata: *Mladenka Đaković*, slovena: *Zlatko Tišljar*, itala: *Sen Rodin*).

Post la oficiala programo, kiel cetero dum la tuta tago, okazis liberaj diskutoj inter la malnovaj aŭ nove akiritaj amikoj. *Davor Klobučar* gitarludis kaj kelkaj kantemuloj helpis lin. Bedaŭrinde ni ne konis sufiĉe bone la tekstojn. Ankaŭ *Sen Rodin* flutis belajn melodiojn.

Aparta interesaĵo estis, ke du junaj italaj filmistoj el Milano (ankoraŭ neesperantistoj, sed sinceraj interesiĝantoj), dum la tuta tago filmis. Kun granda intereso kaj scivolemo mi atendas la lumdiskon!

Ĝis mi vivos, kun granda dankemo kaj kun nostalgio mi pensos pri la bieno de Spomenka, pri la belega Hraščina!



KUN VERKISTOJ EN ZAGORJE

 *Mihaela Cik*

 www.esperanto.hr

Multaj kantas pri bela kaj verda Zagorje, sed por ĉiuj esperantistoj, kiuj meze de septembro vizitis la vilaĝon *Hraščina*, tiuj du adjektivoj havas pli gravan signifon. Jam 11 jarojn *Spomenka Štimec* gastigas en sia bieno *Njeguš* esperantistojn el diversaj landoj ĉe la *Renkontiĝo de Esperantlingvaj verkistoj*. Tiuj renkontiĝoj estas vizitindaj kaj por legantoj kaj por verkistoj: la legantoj povas konatiĝi persone kun aŭtoroj de interesaj verkoj, kaj la verkistoj kun la publiko al kiu iliaj verkoj estas dediĉitaj. Krome, en la piknika atmosfero ĉiam naskiĝas novaj ideoj por estontaj projektoj kaj kunlaboroj.

Ĉi-jare la ĉefa programo de la Renkontiĝo okazis la 14-an de septembro, kiam post la komuna pikniko la gastojn salutis *Judita Rey Hudeček* nome de *Kroata Esperanto-Ligo* kaj *Veronika Poór* nome de *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo* (TEJO). En la belartajn aferojn enkondukis nin *Denis Tišljar* per sia eta kaj agrabla koncerto.


Unue estis prezentita la persa eldono de *"Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić"* de la kroata verkistino *Ivana Brlić-Mažuranić*. En la jaro 2013 ni festas 100 jarojn de la unua apero de tiu bone konata libro, kies Esperanta versio helpis en la tradukado al aliaj lingvoj. La persan eldonon de "Hlapić" prezentis la tradukistino *Achtar Etemadi* el *Teherano*, kiu en la intervjuo kun *Spomenka Štimec* menciis kelkajn

interesajn rilatajn al la traduka procedo. Tre interesaj estas ankaŭ la verkistoj *Júlia Sigmond* el *Rumanio* kaj *Sen Rodin* (kromnomo de *Filippo Franceschi*) el Italio. Pri iliaj verkoj, la mirindaj anekdotoj kaj la komuna vivo parolis *Zlatoje Martinov* kaj *Spomenka Štimec*. Inter aliaj estis prezentita ilia nova libro *"Libazar' kaj Tero"*. *Tihomir Engler* prezentis la kroatan revuon kun internaciaj kunlaborantoj kaj legantaro *"Libri&Liberi"*, okupiĝanta pri porinfana literaturo. La poemojn de *Josip Pleadin* verkitajn inter 2008 kaj 2012 kaj kolektitajn en la poemaro nomata *"Cigna kanto"* legis *Đivo Pulitika* kaj komentis *Zdravko Seleš*. La ĉefa programo finiĝis per invito de *Judita Rey Hudeček* por partopreni en la projekto de komuna tradukado de verko de *Ferid Muhić*.

Samtage kaj samloke okazis ankaŭ Junulara Renkontiĝo kiun gvidis la estrarano de TEJO por homaj rimedoj, aktivula trejnado, scienca kaj faka agado *Veronika Poór*. Ni interkonatiĝis kaj parolis pri la agado de esperantista junularo en Kroatio kaj ĝia plibonigo. Krome, *Veronika* prezentis la projekton de *Muzaiko* - tuttempa Esperanta retradio.

Fine, mi nur povas deziri ke bela Zagorje ankoraŭ multfoje iĝu Esperante verda.

Fotoj: 1) *Sen Rodin*, *Júlia Sigmond*, *Zlatoje Martinov*; 2) *Zdravko Seleš* kaj *Đivo Pulitika*; 3) *Tihomir Engler* kaj *Achtar Etemadi*; 4) *Veronika Poór*; 5) *Denis Tišljar*



FORPASIS LA LASTA TEATRA GRANDULO

 Kerstin Rohdin

Jerzy Fornal, naskiĝinta en 1926, la lasta el la famaj, profesiaj aktoroj, kiuj laboris pri la Esperanto-teatro, forpasis la 31-an de aŭgusto 2013.

La 31-an de aŭgusto atingis **Jerzy Fornal** la lastan momenton de sia laboro en tiu ĉi mondo. Post sia multjara kaj altkvalita prezentado de diversspecaj unupersonaj teatraĵoj, li trankvile endormiĝis en Varsovio en ĉeesto de sia filino **Tamara**. Li pasigis sian lastan tempon en la vivo kun sia filino, kiu multon faris por faciligi lian vivon post la morto de **Zofia Banet Fornalowa**, kiu subite forpasis nian mondon la 19-an de septembro 2012. Tio estis forta bato al ili ambaŭ.

Jerzy Fornal prezentis sian repertuaron en pluraj landoj de la mondo. Dum pluraj jaroj ekde la 1980-aj, li kaj la verkisto **Harold Brown** travivis grandan ĝojon renkontiĝi kaj kunlabori. Ili ofte diskutis pri Esperanto-teatro kaj pri sia propra kuna laboro. Ili forte fekundigis la idearon kaj pensojn de unu kaj la alia. Mi, kiu kunvivis kun **Harold Brown** kaj kiu aranĝis plurajn turneojn en Svedio por **Jerzy Fornal**, ofte renkontis ilin kune kaj povis aŭskulti ilian gajan kaj kreivan interparolon ekde la tempo pri la monda literaturo ĝis kiel plej bone substreki kaj montri iujn detalojn en ilia propra laboro. Estis feliĉaj momentoj aŭskulti la du inteligentajn kaj kreivajn "kulturlaborantojn" naski novajn ideojn kune. Ili estis kiel du knabetoj ludantaj feliĉigajn ludojn, kiuj multe riĉigis la Esperantan teatron kaj la Esperantan kulturon. Mi esperas, ke ni ĉiuj, kiuj havis la bonŝancon travivi iliajn kreaĵojn, por ĉiam portos tion en niaj koroj.

En Högsby/Oskarshamn, kie loĝis **Harold Brown**, estis prezentitaj du premieroj: "EDUKO DANGĜERA", kiu pere de eventoj dum la franca revolucio, kiu tiam 200-jariĝis, montras ke la sinteno de la homo ne ŝanĝiĝas, kiam la jarcentoj ŝanĝiĝas, kaj "VAGABONDO", kvazaŭ biografia prezentado sursceniĝis la unuan fojon en 1992 dum la Kultura SEF-kongreso en Oskarshamn.

"VAGABONDO"-n **Jerzy Fornal** prezentis lastan fojon dum la entombiga ceremonio de **Harold Brown**. Oni ŝoke travivis kiel la akso de la vivo rompiĝis. Eĉ homoj en la publiko, kiuj ne komprenis Esperanton, venis plurfoje diri kiel ili ŝatis kaj "komprenis" la prezentadon. Tio klare montras la altkvaliton de lia laboro.

Famis la prezentado de "ANIARO", verkita de la Nobelpremiito **Harry Martinsson**, tradukita de **William Auld** kaj **Bertil Nilsson** kaj aranĝita por **Jerzy Fornal** de **Gunnar Gällmo**.

Tiu priskribas kiel oni jam dum la 1950-aj jaroj vidis nian mondon senstiratan ŝanceliĝi en la Universo. Vidante **Jerzy Fornal** prezenti ĝin, oni vere travivis la lastajn horojn de nia mondo.

Fragmento el recenzo de "ANIARO" en DEFA-Bulteno (Danio), n-ro 9 1987:

"... Neniam oni aŭskultis tiom da esperantistoj diri absolute nenion dum tiom da tempo. Neniam oni aŭskultis tian esprimriĉecon, tian precizecon, tian voĉon, kiel ĉe Jerzy. Ĉiuj estis tute kapitaj de la alta arto, kiu plenigis la ĉambiron, - kiam la prezento tiel finiĝis, ni apenaŭ kapablis reveni al la "ordinara" mondo, sed volis resti en la mondo, kvankam kruela kaj



timiga, kiun Jerzy kreis antaŭ niaj okuloj. Tre intima estis la travivaĵo, ĉar la "scenejo" estis tiel malgranda kaj la aktoro estis tute proksima al la publiko. Koregan dankon al Jerzy por tiu elstara vespero..."

Fragmento el enkonduko de **Harold Brown** al la programo de "VAGABONDO", 1992:

"... Koncize dirite 'Vagabondo' esprimas la ideon pri rajto de homo al alternativa vivo, eĉ kiam ĝi ne alportas feliĉon, sed tamen donas senton de libereco. Malgraŭ saturanta ĝin per tristo 'Vagabondo' enhavas radion de optimismo, ĉar ja ĝia heroo havas ideon; li volas semi plantojn sur betonaj aŭtoŝoseoj, kaj agente laŭ la Zamenhofa fido... eĉ guto malgranda konstante frapante traboras la montan graniton - esperas fari ion bonan, pozitivan..."

"Mi memoras kaj ofte pensas pri kiam vi kaj Harold vige interparolis pri diversaj eblecoj de Esperanto-teatro. Salutu Harold de mi, kiam vi renkontos lin kaj vi ambaŭ sidos sur la arĝenta rando de la nuboj denove parolantaj pri Esperanto-teatro!" Daŭrigu sur la nubo vian gajan interparolon, vian kreivan kunlaboron por Esperanto-teatro. Ne ripozu en paco! Vivu kune en ĝojo! NI MEMORU VIN!"

SUR MARĜENOJ DE UNU ESPERANTA TRADUKO

 *Dimitrije Janičić*
Lingve kontrolis: *Terezija Kapista*

La fonto de la skribo kaj lingvo de antikvaj makedonoj troviĝas malproksime en nebuloj de tempo. Du makedonoj, Tome Boševski kaj Aristotel Tentov, priskribis la tekston de la mondkonata **Rozeta-ŝtono** (meza parto) kiu estis skribita, kiel ili pruvas, en la malnova makedona lingvo. La historio de tiu mondkonata ŝtono estas aparte interesa. Ĝin trovis franca soldato (el la Napoleona soldataro) apud la urbeto **Rozeta** (nuntempe **Raŝido**) en la jaro 1799. Post la packontrakto en la jaro 1802, la Rozeta-ŝtono apartenis al angloj kaj ĝi estis forportita en Anglujon kaj ekspoziciita en la **Brita muzeo**, kie ĝi troviĝas ankaŭ nuntempe.

La **Rozeta-ŝtono** estas unu el la plej konataj tekstaj artefaktoj de antikva Egiptujo. Tiu ŝtono, rilate la tekston sur ĝi, estas temo de pli granda nombro de sciencaj studoj, ĉar en la sama loko troviĝas identa teksto en tri lingvoj. Tio povas esti interesa por sciencistoj, historiistoj, arkeologoj, por homoj kiuj esploras la pasintecon kaj la egiptajn hieroglifojn.

Ni ne volus paroli pri scienca valideco de ĉi tiu esploro, kiu verŝajne estas la unua tia, kaj ankaŭ ne pri diversaj opinioj rilate la antikvan Makedonion. Ili estas temoj por aliaj fakuloj, sciencistoj, historiistoj... Por esperantistoj estas tre grava la traduko de ĉi tiu verko en Esperanto.

Pro kio mi tion diris?

Traduko de sciencaj tekstoj, escepte el arkeologio kaj egiptologio, estas tre interesa pro specifaj esprimoj pri tiu temo kaj pro scienca maniero de esprimado. Esperanto kiel lingvo fariĝas ĉiutage pli riĉa dank' al verkistoj kaj tradukistoj kiuj eniras specifajn kaj malmulte uzitajn kampojn de



literaturo kaj scienco. Tian kuraĝon havis nia forpasinta profesoro kaj konata esperantisto, la direktoro de Instituto de Esperanto de Serbio **Boriša Miličević**. Miaopinie, li tiun tradukon faris tre sukcese kaj tre bone plenumis la malfacilan laboron, ĉar klarigado de antikvaj manuskriptoj ne estas ĉiutaga kaj ofta traduklaboro.

La libro titolita **"Laŭ spuroj de la skribo kaj de la lingvo de antikvaj makedonoj"** estas verkita en dekdu ĉapitroj kaj ampleksas pli ol okdek paĝojn de granda (B5) formato malgrandlitere kompostitaj. Post la enkonduka teksto, la aŭtoroj priskribas la bazajn karakterizojn de la analizita skribo, poste ili skribas pri sonigo de identigitaj signoj, pri iuj reguloj de skribado (la teksto estas skribita per greka demotika skribo). Aparte estis menciitaj nomoj de faraonoj kaj imperiestraj prauloj, kategorioj de junaj servistinoj kaj pastroj, nomoj de teritorioj kaj popoloj, kaj nomoj de dioj kaj iliaj funkcioj. Kompreneble, la verko enhavas

sciencajn referencojn kaj resumon, sed ĝis nun tio estas la unua provo argumenti, ke la meza teksto estas skribita en la malnova makedona lingvo.

La eldonisto de ĉi tiu libro estas **Esperanto-societo "La Progreso"** el la makedona urbo Prilep, nuntempe la plej aktiva Esperanto-organizo en Makedonio.

La aŭtoroj diras, ke la baza supozo de esplorado estis la uzitaj tri skriboj, sed en tri lingvoj: la antikva egipta (hieroglifa), la antikva makedona (kun greka demotika skribo) kaj la antikva greka (kun la antikva greka alfabeto). La tiamaj regantoj de Egiptujo devenis de **Ptolomeo Soter**, generalo de **Aleksandro Makedona**. De tie alvenas la konkludo, ke li estis makedono, kaj de tie la nova konkludo ke la tria lingvo (sur **Rozeta-ŝtono** – en la mezo) estas la makedona. "Estas konkludita – skribas la aŭtoroj en la konkludo de la studo – ke por la meza teksto de **Rozeta-ŝtono** estis uzita la silaba skribo de tipo konsonanto/vokalo. Estis identigitaj simboloj por 25 konsonantoj. Por utiligado de la proceduro de spegulado kaj rotacio je skribsurfaco estis determinita unusignifa maniero por kunigo de la simbolo de konsonanto kun kvar aŭ ok vokaloj".

Kvankam la aŭtoroj en la enkonduko diras ke pri **Rozeta-ŝtono** ekzistas granda nombro de studoj – ili ne analizas tiujn studojn, eĉ ne mencias ilin. Ili proponas siajn opiniojn.

Por ni esperantistoj, estas grava la bona traduko de ĉi tiu teksto, la traduko kiu per la labormaniero, la uzitaj sciencaj esprimoj kaj la konciza, klara maniero de esprimado, signifas gravan kontribuon al la internacia lingvo.



Jarkunveno de KEL: Venko de demokratio?

Mi eklegis la artikolon kun granda intereso, sed tuj mi sentis honton kaj malintereson. La artikolo tiom negativa similis kaj memorigis min al la pasintjara jarkunveno en Koprivnica.

Kutime naciaj bultenoj kiuj internacie informas pri loka aŭ enlanda Esperanto-agado spegulas laboron de miloj da volontuloj kaj donas ideojn kiel plibonigi aktivecojn kiujn ni mem organizas. Por ĉiu aktivulo, legi pozitivajn artikolojn pri alies agado estas granda stimulo, plezuro. Tion oni rakontas al ĵurnalistoj por montri kion faras esperantistoj en aliaj landoj kaj ke Esperanto daŭre vivas. Bedaŭrinde, la menciita artikolo malgajigas kaj hontigas. Oni instruis al mi, ke "malpurajn vestaĵojn oni lavu hejme", sed ne internacie. Jes, Zamenhof certe ne imagis tiel la interhoman kunlaboron! Ekzistas proverbo kiu diras: "Helpu se vi povas, sed certe ne MALHELPU", aparte se temas pri Esperanto kaj ĉiuj pozitivaj agoj de homoj, kiuj volontulas kun amo kaj dum sia libera tempo... Prefere oni demandu sin: "Kion mi faru, diru, aŭ kiel mi agu por la movado, ke ĝi antaŭenigu la grandan ideon. Agante internacie, ni ja estas iaj ambasadoroj de nia lando – tion ĉiu konsciu partoprenante la Esperanto-movadon.

Mi petas, ne plu sendu al mi "Zagreba Esperantisto"-n. Forprenu mian nomon de la sendolisto. Mi jam ricevas "Tempo"-n kaj ĝi informas min pri diversaj aktivecoj.

Zdravka Metz (Montréal, Kanado)

Mi volas informi vin ke hodiaŭ mi ricevis du numerojn de "Zagreba Esperantisto" (2013/1 kaj 2013/2). Dankon pro la rapida servo. Mi aparte ŝatis legi la artikolon verkitan de Ante Biluš en 2013/2. Tre plaĉas al mi la ideo en ĝi ke, kiam Kroatio iĝas membro de Eŭropa Unio, ĝi devus elekti

Esperanton kiel sian oficialan lingvon en tiu organizo. Kia brila ideo! Jes! Jes! Mi konsentas ke baldaŭ kelkaj aliaj malgrandaj landoj en la Eŭropa Unio ankaŭ elektus Esperanton. Eble poste Italio kaj Hispanio kaj Germanio farus la samon. Mi opinias ke tio estas bona plano kiu malrapidigus kaj finfine haltigus la dominadon de la angla lingvo en Eŭropa Unio. Se la registaro de Kroatio farus tion, mi certe venus al Rijeka por partopreni la dekan kongreson de Eŭropa Esperanto-Unio kiu okazos dum venonta julio, kaj mi supozas ke multaj aliaj esperantistoj el la tuta mondo farus la samon. Bedaŭrinde ĝis nun la registaro de Kroatio ne sekvis la bonegan planon, sed ĉu ĝi volus elekti Esperanton kiel sian lingvon en la estonteco? Kial ne?

*Ronald Glossop, direktoro
de Infanoj ĉirkaŭ la Mondo
<http://www.icxlm.org>*

Dankon pro la "Zagreba Esperantisto" n-ro 2/2013, kaj apartan dankegon al sinjoro Ante Biluš pro la artikolo "Dominado de la angla en Eŭropa Unio". Elkore mi voĉdonus por la propono de sinjoro Ante Biluš, kvankam ĉe la fino de sia artikolo, sinjoro Biluš skribis pri iu alia nacio. Mi pensadis pri tiu kuraĝa - saĝa - decida - viziema ŝtato (laŭ la vortoj de Ante Biluš). Eble Germanio kaj Aŭstrio interkonsentus, ke unu el ili (aŭ Germanio aŭ Aŭstrio) postulu la germanan lingvon, kaj la dua el ili (aŭ Aŭstrio aŭ Germanio) postulu Esperanton. Eble Cipro postulus Esperanton, ĉar Grekio postulas la grekan lingvon. Eble Belgio, ankaŭ sendolore, postulus Esperanton, ĉar Francio kaj Nederlando postulas la francan kaj la nederlandan lingvojn. Sed se Belgio postulus la francan kaj nederlandan lingvojn, tiam Nederlando kaj Francio povus postuli Esperanton. En Nederlando nun estas sidejo de UEA. Nederlando do estas la ĉefurbo de Esperantujo. Mi legis ke antaŭ 90-100 jaroj Ligo de Nacioj

rifuzis la proponon pri Esperanto per voĉdonado, respektive per vetoo de Francio. Ĉu nun Francio komprenas ke ne estas demando "aŭ la franca aŭ Esperanto", sed "aŭ la angla aŭ Esperanto". Bedaŭrinde, la historio ne estas instruistino de la vivo. Mi opinias ke Kroatio estas tro malforta por fari tiun grandspiritan - vastaniman - kuraĝan - saĝan - decidan - vizieman agon. Ĉu Francio kaj Germanio estas sufiĉe grandanimaj - vastspirataj - kuraĝaj - saĝaj - decidaj - viziemaj? Aŭ Francio kaj Germanio similas al Kroatio kaj Luksemburgio?

Ljubica Sedmak (Pomer)

Kiel konate, dum la historio homoj ĉirkaŭ ni (kaj eble ankaŭ ni mem), suferis pro malsanoj, diversaj handikapo, mizeroj, malhavo de vivbezonaĵoj ktp. Tiaj situacioj aperas de tempo al tempo, sed ili ne devas esti eterna konstanto de nia vivado. La historio al ni instruas, ke bonon kaj malbonon faris la homo mem, respektive la homaro. Ne ekzistas pli bona vivcelo ol ekstermi la malbonon kaj disvastigi la bonon. La fontoj de malbono estas nekonado, nescio, malinteresiĝo, pigreco, egoismo kaj memamo. La fontoj de bono estas scio, interkompreniĝo, laboremo, diligenteo, humaneco, homamo. Kiam maljuna indiano klarigadis al junaj indianoj, ke la mondo de blankuloj (kaj de ni mem) ne estas bona, li diris, ke en la homo interbatalas kaj baraktas du lupoj: la bona kaj la malbona. Je la demando de juna indiano, kiu lupoj venkos, la maljuna indiano respondis: "Tiu, kiun vi nutras!"

La ideo de Zamenhof estis, ke la homoj sur la Tero kunvivu kiel gefratoj.

Tiu celo estu ankaŭ la celo de la gazeto "Zagreba Esperantisto". En ĝi aperu NUR ideoj pri progreso de Esperanto kiel ilo por progresigi la homaron.

Tiu celo havas naturan superecon super aliaj celoj en la vivado kaj mortado.

Teodor Mikić (Panjani)



Publike pri Esperanto

En "Zagreba Esperantisto" n-ro 2/2013 mi legis interesan artikolon pri Nikola Tesla. Mi tute konsentas kun ĝia enhavo. Bonege ke vi skribas ankaŭ pri FBI, kiu sekretigis post la morto de Tesla ĉiujn dokumentojn de la sciencisto. Mi atendis ankaŭ informon pri lia gravega eltrovaĵo kiun li montris en elektra aŭtomobilo. La aŭtomobilo uzis elektan motoron kaj energion ĉerpitan per speciala sistemo "el aero". Tesla volis ekintresigi gravajn decidpovajn personojn pri tiu epoka eltrovaĵo, sed neniu kredis al li kaj eĉ ne volas rigardi lian aŭton kiu dum ĉirkaŭ du semajnoj veturis tra la urbo per tiu moviga sistemo. Tesla koleris kaj kun granda bedaŭro malmuntis la sistemon kaj revenis al benzina motoro. Mi pensas ke la ĉefa kaŭzo de la sekretigo estas la timo, ke facile atingebla energio povas ruinigi jam fortegajn petrolajn koncernojn.

Tio montras ke eltrovaĵoj - inventaĵoj de Tesla multe antaŭiris la epokon en kiuj li vivis. Iom simile siajn geniajn verkojn kreis Leonardo Da Vinci. Jam ekzistas societo kiu kiel sian ĉefan taskon deklaris batali kontraŭ FBI kaj usonaj sekretaj arkivoj por rekonstrui la nefinitajn projektojn de Nikola Tesla kaj malsekretigi liajn sciencajn projektojn.

Bonege ke vi ne timas skribi pri aferoj kiuj alproksimiĝas aŭ trairas la delikatan limon inter scienco kaj parascienco (mi pensas pri esploroj kiujn oficiale ne akceptas la akademia scienco). Mi volonte legus en via revuo aliajn artikolojn pri tiu problemaro. Iam mi skribis artikolon en nia Lodza kluba informilo kun bazaj informoj pri la fenomeno de NIFO-j (= neidentigitaj flugobjektoj). Bedaŭrinde, la legantoj atakis min per aserto ke mi skribas pri neekzistantaj aferoj.

Por mi la literoj en la revuo estas iom tro malgrandaj.

Robert Kamiński (Lodzo, Pollando)

- "**Ĉovjek i svemir**", gazeto de Zagreba observatorio, en sia numero 4/2012-2103, paĝo 32, publikigis la tekston de Gustav Kren "*Susret generacija i obilježavanje stote godišnjice rođenja Gabrijela Divjanovića, dugogodišnjeg upravitelja Zvezdarnice*".

- "**Bjelovarski list**" en sia numero 260 de la 9-a de septembro, paĝo 19, publikigis la artikolon "*Programu obilježavanja Dana grada pridružuju se i esperantisti*".

- "**Bjelovarac**" en sia n-ro 34, de la 5-a de septembro, paĝo 41, publikigis la artikolon "*Sablove pjesme na esperantu*".

- "**Slobodna Dalmacija**" (Split) en sia numero de la 1-a de septembro, paĝo 17, publikigis la artikolon "*Dalmacija je predivna, jedva čekam opet doći!*" de Davor Grgat.

- "**Slobodna Dalmacija**" en la numero de la 2-a de aŭgusto publikigis la artikolon "*Esperantska Europa u malom*" de Davor Grgat.

- "**Šibenski list**" n-ro 2589 de la 8-a de aŭgusto publikigis la artikolon "*Europa u malom na Jadranskom ljetovanju*" de Davor Grgat.

- **Kroata radio** en la elsendo "*Mil perloj*" la 10-an de aŭgusto publikigis intervjuon de sia ĵurnalistino Josipa Petrina pri "Adriatika feriado".

- "**Virovitički list**" en septembro publikigis la artikolon "*Međunarodni planinarski susret esperantista na Jankovcu*".

- **Radio Terezija** en Bjelovar, elsendis 22-minutan intervjuon kun Franjo Forjan kaj Josip Pleadin okaze de Eŭropa tago de lingvoj, la 25-an kaj 26-an de septembro.

- "**Bjelovarac**" en sia numero 37 de la 26-a de septembro publikigis la artikolon "*Hobi pretvorio u posao i nije požalio*" de Ružica Stojković pri la esperantisto Željko Saks.

- Portalo www.djurdjevac.hr - la oficiala portalo de Urbo Đurđevac, publikigis la artikolon "*Đurđevački esperantisti aktivni u Bjelovaru*" la 26-an de septembro.

- Portalo www.djurdjevac.eu publikigis la 26-an de septembro la artikolon "*Pokal za đurđevačke esperantiste*".

- La oficiala retejo de **Gimnazio Đurđevac**, ĉe http://www.gimnazija-ikranjceva-djurdjevac.skole.hr/skolske_vijsti?news_id=829 publikigis la 25-an de septembro la artikolon de Zdravko Seleš "*Gimnazijalke pobjednice na esperantskim natjecanju u recitiranju*".

- "**Podravski list**" n-ro 583, la 30-an de septembro publikigis la artikolon "*Ana Lulić i Arijana Tkalčec najbolje u recitiranju*" (paĝo 25), kaj artikoleton sen titolo pri la sama temo sur la paĝo 14.

- "**Virovitički list**" en septembro publikigis la artikolon "*Esperantisti uživali u čarima Jankovca*".

- "**Bjelovarac**" n-ro 38 de la 3-a de oktobro publikigis sur la paĝoj 30-31 la artikolon "*Stare razglednice, fotografije, akvareli*" de Ružica Stojković, dediĉitan al la programo "Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo".

- "**Večernji list**" en sia numero de la 24-a de julio publikigis la artikolon "*Esperantisti opet plove Kupom od Karlovca do Siska*".

- "**Večernji list**" la 2-an de aŭgusto publikigis la artikolon "*Iz Karlovca su Kupom krenuli prema Sisku*" de ĵurnalistino Marin Bakić.

- "**Jednota**", la ĉeĥlingva gazeto el Daruvar, en la numero 41 de la 19-a de oktobro (paĝo 19), publikigis la artikolon de Zdenka Polášková "*Bjelovaršti esperantisté představili knihu Marie Hořínkové*".

- "**Bjelovarac**" n-ro 40 de la 17-a de oktobro publikigis la artikolon de sia ĵurnalistino Ružica Stojković "*Perfekcionist u poslu i sanjar u slobodno vrijeme*" pri esperantisto Berislav Rubčić.

Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo



BJELOVAR
23-an de septembro 2013

fotolovric@gmail.com